

Revue de religion comparée bilingue (espéranto et français) / Religikompara revuo  
 Association Internationale d'Etude des Enseignements Spirituels et Théologiques

**ASISTI : Asocio de Studado Internacia pri Spiritaj kaj Teologiaj Instruoj**

Neŭtrala asocio kunlaboranta kun TEL (Tutmonda Ekumena Ligo), JBLE (Japana Budhana Ligo Esperantista), OKEJ (Ortodoksa Klubo de Esperantaj Judoj), U.E.A. , WCRP (*World Conference on Religion and Peace*).  
 Membro-grupo de IARF (*International Association for Religious Freedom* / Internacia Asocio por Religia Libereco).

## Balotado por la prezidanteco kaj sekretarieco de ASISTI !



**S-ro UMEDA Yosimi, ASISTI-prezidanto** (dum gvidado de forumo kun, dekstre, s-ro François Degoul)

Вторая Минская Международная  
 Молодежная Конференция

“10 лет спустя:

экология души = экология планеты”

Общность этико-экологических принципов  
 религиозных традиций

2 - 5 мая 1996 года



**Dua Internacia Junulara  
 Konferenco en Minsk**

**10 jarojn post Ĉernobil:  
 Ekologia kaj spirita etiko  
 kiel komuna religia tradicio**

**2 / 5-5-1996 (vidu p .28 !)**

## Vorto de la redaktoro

Por la plejparto el vi, kiuj bredaŭrinde ne iros al Prago, ni alvokas nepre partopreni en la balotado por la (re)elekto de la Prezidanto kaj Sekr. (vd p.32)

Malgraŭ mia klopodo neniu el vi kandidatiĝis, kio eble signifas ke vi, malgraŭ ĉio, tamen estas sufiĉe kontentaj pri la nunaj, almenaŭ mi esperas.

La anoncita 3-a ISE bedaŭrinde ne okazos sed la **Inter-Religia Kunveno Esperantista** pritraktos, trihore dum la UK, ĝian temon: "*Integreco de la sano, fizika, psika kaj spirita*", al kiu pluraj paĝoj de tiu ĉi numero estas do dediĉitaj (ĉefe p. 20-26). (Prelegetontoj ankoraŭ bonvenaj: bv. kontakti Pavlan)

Kiel daŭran celebradeton de **Unuiĝintaj Nacioj** ni tradukas komenton de ties **Homrajta Komitato** pri la **Internacia Konvencio pri Civilaj kaj Politikaj Rajtoj** (kiu devus aplikigi al Tibeto!): sekve de la alvoko en Bangaloro (15p.4) al "*formado de konstanta interkeda organizaĵo (forumo, parlamento aŭ konsilio) aliĝunta al UNo kiel NRO*", ni nun publikigas similan de Oomoto, prezentitan en Novjorko okaze de komuna Diservo honore al la 50-a datreveno.

N.B. **Bonvolu** laŭeble **sendi viajn artikolojn** ktp. en formo de dokumentoj en *Word.6* (aŭ kongruaj: *Word Perfect...*) sur disketoj (3 1/2), plie de la surpapera kutima formo: tiel mi ŝparos la enkomputiligan retajpadon.

**Ligila Organo de ASISTI (Asocio de studado internacia pri spirita kaj teologiaj instruoj) ĉ. trimonata Red.** : Presbytere, F-09800 Balagué (Tel +33 61 04 70 66).

**ASISTI-estraro:** Prez. Yosimi Umeda - Bradjo Moro : kasisto - Ch. Lavarenne : sekr. k vickas. - Pavla Dvořáková (Ostravská 637, CZ-19900 Praha 9, tel/faks : 42 (2?) 6282952 ; kaj B. Westerhoff ?) : kunvenoj - F. Degoul : eksteraj rilatoj - Leif Nordenstorm : Religia Antologio (Landstingsvägen 9A, S-96176 Boden, tel. : 0921-12354).

**Directeur de Publication :** Christian Lavarenne

**Jarabono :** triono de UEA-individa abono (MA), t.e. 100ff / 32gld / 29DM / 18\$ (duonpreze por malriĉaj l.) al :

- franca poŝtkonto *Asistilo*, n-ro 1042177R Marseille

- UEA-konto asis-r

- FEL-konto clvr-n

- norvega *postgiro*: Ch. Lavarenne n-ro 0540-7849940

- Marek Krainki, ul. Albanska 28/2, PL-60 134 Poznan

- aŭ B. Moro, Srytka 147, PL-47-220 Kedzierzyn-Kozle

**Subtena abono :** ekde 150 ff / 50 gld / 50 DM / 30 \$ . . .

**Abonhelpa fonduso :** pliaj abonoj laŭ la tarifo valida por vi mem ; vi rajtas indiki la adresojn de la ricevontoj...

**ASISTI-kotizo 1996 :** deviga por esti membro, kiu ajn ĝi estu (sed minimume kvarono de la UEA-MJ : 9,5gld, por okcident-Eŭropo, norda Ameriko, Japanio)

**Subtena membro :** ekde 200ff / 70 gld / 70 DM / 40\$

...**Ne forgesu kontribui, koran dankon !**

## Enhavo

<i>Silento</i> de J.E. Southall, trad. de Majk Sadler (GB/H)	p. 3
Konfeso de la Teistoj (1768), de <b>Voltaire</b> (F)	p. 4
La <i>Raĝa-Jogo</i> de la Braĥmo-Kumaroj, de Sarah Ferrand (F)	p. 5
Prenu la tempon, anonima (trovita en Norvegio)	p. 6
Jogosutro de Patañĝali (IV-a jc. a.K.), kun komentarioj de Vjaso (Bharato)	p. 8
La Trezoro : Vortaro de arabaj kaj <b>islamaj proverboj</b> , de Hussain Al-Amily (GB)	p. 12
<b>Leteroj de legantoj</b> : Jacqueline Lépeix (F) kaj Raymond Lecat (Egiptio)	p. 12
<i>La Serio pri Gilgameŝ</i> , de Sînleqe'unnennî (Asirio, XII-a jc. a.K. ?)	p. 13
Tibeto : Kaj nun, <b>du</b> Panĉhen-Lamaoj ???	p. 16
30-jariĝo de la UNa <i>Internacia Konvencio pri Civilaj kaj Politikaj Rajtoj</i> (Usono)	p. 18
<b>Religia UNO nepre necesas !</b> Al mondskala interreligia kunlabor-strukturo (J)	p. 19
La Serĉado de l' Sankta Gralo : La mirakla resaniĝo (romanika romano el la XIII-a jc.)	p. 20
Enkonduko en Ajurvedon, de Vera Tuinder Dekker (NL)	p. 24
Gusto de akvo, de TAHARA Ken (J)	p. 26
Kio estas <i>Amikaro Bruno Gröning</i> ?, de François Degoul (F)	p. 27
<b>Leteroj de legantoj</b> : Rŝi Kumaro-Daso (Aŭstralio), P-ro F.W. Rostworowski (PL)	p. 27
J. Martignon (F), G. Gällmo (S), A. Schaeffer (A), S. Walper (N), Z. Mjeda (Alb.)	p. 28
<b>Urĝa anonco : 2-a Internacia Junular-Konferenco en Minsk</b> (Bjelorusio)	p. 28
Paĝo sub la respondeco de OKEJ : <i>Ortodoksa Klubo de Esperantaj Judoj</i> (Israelo)	p. 29
Por mondharmonio : la <i>Homekologio</i> , de Jaroslav Karhan (CZ)	p. 30
Anoncoj : <i>La Japana Budhano</i> ; kaj <i>Nuntempaj spiritaĵoj</i> de F. Fegoul (F)	p. 31
<b>Balotado</b> por la (re)elekto de la Prezidanto kaj Sekretario de ASISTI	p. 32

# Silento

J. E. Southall (1855-1928)

*Prepare al la "Komuna silentado" kiu okazos dum la Universala Kongreso en Prago, al kiu estas elkore invitataj ĉiuj, eĉ se tute ne religiemaj : la sperto de silentado povas, anstataŭ malkovro de iu Dio, same bone fariĝi malfermiĝo al "io" – al propra profundo, kio jam estas tre impresa. La partoprenantoj en la lasta "Komuna silentado" en Valencio povas atesti ke tio estis valora sperto por ĉiu, sendepende de ties kredo. (La Red.)*

Jen maniero koni Dion. « Estu kvieta, kaj sciu ke mi estas Dio ». « Dio estas en sia Sankta Templo ; la tuta tero restu silenta antaŭ Li. »

Antaŭ dudek jaroj, amiko enmanigis al mi libreton kiu fariĝis unu el la turno-punktoj de mia vivo. Ĝi nomiĝis « Vera Paco ». Mezepoka mesaĝo kun unusola penso : ke Dio atendas, en la profundo de mia esto, por paroli al mi, se mi povus fariĝi sufiĉe trankvila por aŭdi lian voĉon.

Mi pensis ke tio estus tre facila afero, kaj mi komencis kvietigi min. Sed tuj kiam mi komencis, tumulto da voĉoj trafis miajn orelojn, de ekstere kaj interne, ĝis mi nenion povis aŭdi krom ili bruado. Kelkaj el ili estis mia propra voĉo, kelkaj estis miaj propraj demandoj, kelkaj estis miaj preĝoj. Aliaj estis la sugestoj de la Tentisto, kaj voĉoj de nia maltrankvila mondo.

Neniam antaŭe ŝajnis esti tiom da aferoj por fari, por diri, por pensi ; kaj al ĉiu direkto mi estis puŝata kaj tirata, kaj salutata per bruaj krioj de neimagebla agitado. Ŝajnis al mi necese aŭskulti kelkajn el ili, sed Dio diris : « Estu trankvila, kaj sciu ke mi estas Dio ». Tiam venis la konflikto de pensoj pri la morgaŭo, kaj ties devoj kaj zorgoj ; sed Dio diris : « Estu kvieta ».

Kaj dum mi aŭskultis, kaj malrapide lernis obei, kaj fermis miajn orelojn al ĉiu sono, mi trovis, post kelka tempo, ke kiam la aliaj voĉoj ĉesis, aŭ mi ĉesis aŭdi ilin, estis eta, kvieta voĉo en mia profundo, kiu

komencis paroli kun neesprimebla tenero, potenco kaj konsolo. Dum mi aŭskultis, ĝi fariĝis por mi la voĉo de preĝado, kaj la voĉo de saĝeco, kaj la voĉo de devoj, kaj mi ne bezonis pensi tiel pene, nek preĝi tiel pene, nek fidi tiel pene, sed tiu « eta, kvieta voĉo » de la Sankta Spirito en mia koro estis le preĝo de Dio en mia kaŝita animo, estis Dia respondo al ĉiuj miaj demandoj, estis Dia vivo kaj forto por animo kaj korpo, kaj fariĝis la esenco de ĉia scio, kaj ĉia preĝo, kaj ĉia beno ; ĉar ĝi estis la vivanta Dio mem kiel esenco de mia vivo.

Jen la plej profunda bezono de nia spirito. Tiel ni lernas koni Dion ; tiel nutriĝas kaj refreŝiĝas nia spirito. Tiel ricevas nutraĵon nia koro ; tiel ni akiras la *Vivantan Panon* ; tiel niaj propraj korpoj kuraciĝas, kaj nia spirito ensorbas la vivon de nia Leviĝinta Sinjoro, kaj ni iras antaŭen al la konfliktoj kaj devoj de la vivo kiel floro kiu ensorbis, dum la ombro de la nokto, la freŝajn kristalgutojn de roso. Sed, samkiel neniam falas roso dum ŝtormaj noktoj, tiel la roso de Lia favoro neniam venos al maltrankvila animo.

Ni ne povas forte kaj freŝe trairi la vivon se ni veturas konstante per ekspres-trajnoj ; ni bezonas kvietajn horojn, sekretajn lokojn de la Plej Alta, tempojn por atendi je la Sinjoro, kiam ni renovigas nian forton, lernas supreniri per flugiloj kiel agloj, kaj poste reveni por kuri senlace kaj antaŭeniri sentime.

(Trad. Majk Sadler)

# Konfeso de la Teistoj\*

(...) Ni estas pli ol unu miliono da homoj en Eŭropo, kiujn oni povas nomi teistoj ; ni aŭdacas atestigi pri tio la unikan dion al kiu ni servas. Se oni povus kuniĝi ĉiujn kiuj, sen ekzameno, lasas sin delogi al la diversaj dogmoj de la sektoj kie ili naskiĝis, se ili sendus sian propran koron, se ili aŭskultus sian simplan racion, la tero estus kovrita de niaj similuloj (...)

Nia religio sendube estas dia ĉar ĝi estis gravurata en niaj koroj de Dio mem, de tiu majstro de la universala racio, kiu diris al la Ĉino, al la Hinduo, al la Tataro : Adoru min kaj estu justa.

Nia religio estas same malnova kiel la mondo, ĉar la unuaj homoj ne povis havi alian, egale ĉu tiuj unuaj homoj nomiĝis *Adimo* kaj *Procriti*<sup>1</sup> en parto de Hindio, kaj *Brama*<sup>1</sup> en la alia parto, aŭ Prometeo kaj Pandora ĉe la Grekoj, aŭ *Osireth*<sup>2</sup> kaj *Isth*<sup>2</sup> ĉe la Egiptoj, ĉu ili havis en Fenicio nomojn kiuj la Grekoj tradukis per tiu de *Eon* ; ĉu fine oni volas akcepti la nomojn Adamo kaj Eva, donitajn al tiuj unuaj kreitaĵoj en la postaj tempoj, de la malgranda juda popolo. Ĉiuj nacioj konsentas pri tiu punkto, ke ili antikve rekonis unu solan Dion, al kiu ili faris simplan kaj senmiksan kultron, kiu ne povis unue esti infestita de superstiĉaj dogmoj.

Nia religio (...) estas do la ununura kiu estas universala, same kiel ĝi estas la plej malnova kaj la sola dia. Nacioj devojigitaj en la labirinton de mil malsamaj sektoj, teismo estas la bazo de viaj fantaziaj sistemoj...

Ni adoras ekde la komenco de la aĵoj [t.e. de la mondo] la Dion unikan, eternan, rekompencanton de la virto kaj venĝanton de la krimo ; ĝis tiu punkto ĉiuj homoj konsentas, ĉiuj rediras post ni tiun konfeson.

La centro kie ĉiuj homoj kuniĝas en ĉiuj tempoj kaj en ĉiuj lokoj estas do la vero, kaj la disiĝoj disde tiu centro estas do la mensogo.

## Ke Dio estas la patro de ĉiuj homoj

Se Dio kreis la homojn, ĉiuj estas al li egale karaj, kiel ĉiuj estas egalaj antaŭ li ; absurde kaj malpie estas do diri ke la komuna patro elektis malgrandan nombron el siaj infanoj por ekstermi la aliajn en lia nomo (...)

## Superstiĉoj

La tuta tero stariĝu kontraŭ ni, se ĝi aŭdacas tion fari ; ni alvokas ĝin kiel atestanton pri la pureco de nia sankta religio. Ĉu ni iam makulis nian kultron per ia el la superstiĉoj kiujn la nacioj riproĉas unu al la aliaj ? Oni vidas ke la Persoj, kvankam pli senkulpiĝeblaj ol siaj najbaroj, kultas al la suno kiel al la neperfekta bildo de la Dio kiu animas la naturon ; la Sabeoj<sup>3</sup> adoras la stelojn ; la Fenicioj ofertas al la ventoj ; Grekio kaj Romo estas supersutitaj per dioj kaj fabeloj ; la Sirianoj adoras fiŝon. La Judoj, en la dezerto, adorkliniĝas antaŭ kupra serpento<sup>4</sup> ; ili vere adoris kofron kiun ni nomas la *kesto* [de *Interligo*], imitante per tio plurajn naciojn kiuj kunportis siajn malgrandajn sanktajn statuetaĉojn en kofroj ; pri tio

atestantoj estas la Egiptoj, la Sirianoj ; atestanto estas la kofro kiu estas preparolita en la « *Ora azeno* » de Apuleo (libroj IX kaj XI)<sup>5</sup>.

Ni ne peze insistos pri la abomenindaj superstiĉoj de tiom da aliaj nacioj ; ĉiuj estas infektitaj de ili, krom la ĉinaj kleruloj, kiuj estas la plej malnovaj teistoj sur la tero (...)

## Homsangaj oferoj

Ĉu ni iam kulpis pri la freneza kaj horora superstiĉo de magio, kiu igis tiom da popoloj prezenti al la supozaj dioj de aero kaj al la supozaj inferaj dioj, la sangajn membrojn de tiom da junuloj kaj tiom da junulinoj, kiel karajn oferojn al tiuj imagaj monstroj ? Ankorau hodiaŭ mem la loĝantoj sur la bordoj de Gango, de Induso kaj sur la Koromandelaj marbordoj, rigardas kiel la klimakson de la sankteco, la fakto sekvi riĉajn kaj belajn junulinojn kiuj iras por forbruli sur la ŝtiparo kie kuŝas iliaj mortintaj edzoj, pro la espero esti rekunigitaj kun ili en nova vivo. Jam tri mil jarojn daŭris tiu terura superstiĉo, kun kiu kompare, la ridinda silento de niaj anakoretoj, ilia enuiga ĉanto, ilia malbona nutraĵo, iliaj pentaj harĉemizoj, iliaj malgravaj memseveraĵoj povas eĉ ne esti rigardataj kiel pentofaroj. La brahmanoj, anstataŭiginte post jarcentoj da pura kaj senmakula teismo per superstiĉo la simplan adoron al la Absoluta Esto, koruptis siajn vojojn kaj finfine kuraĝiĝis tiujn oferojn. Tiom da hororo ne envenas el Ĉinio, kies saĝa registaro estas, de preskaŭ kvin mil jaroj, sen iaj frenezaj superstiĉoj. Sed ĝi disvastiĝis en la reston de nia hemisfero. Ne estas popolo kiu ne ofer-mortigis homojn al Dio, kaj ne estas popolo kiu ne estis delogata de la abomeninda iluzio de magio (...)

Tiu pasiego de magio, komuna al ĉiuj nacioj, preparas la homojn al religia kaj infera krueleco, kun kiu ili certe ne naskiĝis ĉar el mil infanoj vi ne trovos unu kiu amas verŝi la homan sangon (...)

Nun, oni malfermu ĉiujn analojn de la mondo, oni demandu ĉiujn homojn, oni ne trovos unu teiston kulpan pri tiuj krimoj. Ne, ne estas unu kiu iam pretendis scii la estonton en la nomo de la diablo, aŭ kiu estis mortiganto en la nomo de Dio.

Oni diros al ni ke same estas pri la ateistoj, ke ili neniam estis ridindaj sorĉistoj aŭ fanatikaj barbaroj. Ve ! kio devos esti konkludata el tio ? ke la ateistoj, kiom ajn aŭdaciaj, kiom ajn devojigitaj ili estas, kiom ajn dronitaj en monstra eraro, restas pli bonaj ol la fanatikaj paganoj, judoj kaj kristanoj.

Ni kondamnas ateismon, ni malamegas la barbaran superstiĉon, ni amas Dion kaj la homaron : jen niaj dogmoj.

## Voltero (1694-1778)

\* 1768. El *Oeuvres complètes*, Paris, 1853, VI, p.112b-121b.  
1/ Sanskrite : *prakrti-*, *brahman-*. 2/ PIV-e : Oziriso, Izisa.  
3/ Vidu *Korano* 2,63 , 5,70 kaj 22,18 ; konfuzenda nek kun la Sabeoj nek kun la Ŝebaanoj ! 4/ Vidu *Nombroj* 21,8-9.  
5/ Apuleius, de Madaŭro, verkisto el la II-a jc p.K.

# La Raĝa-Jogo de la Braĥmo-Kumaroj :

## *Kiam meditadi signifas transformi...*

Partoprenante en sia unua UK en Varsovio okaze de la centjariĝo de Esperanto, la *Red.* vizitis tie, kun Mikael Hultgren, aŝramon de la Braĥmo-Kumar-oj<sup>1</sup>, t.e. meditan centron de internacia hinddevena spirita movado, kies membro tiu ĉi estis en Svedio. La kontakto bedaŭrinde perdiĝis, malgraŭ provo verkigi al li artikolon pri ilia instruo de Raĝa-Jogo<sup>2</sup>. Sed en la *WCRP-kolokvo pri Eŭropo*<sup>3</sup> en 1993 partoprenis tri francaj Braĥmo-Kumaroj, kaj la promeso de unu el ili, **Sarah Ferrand**, konkretiĝis per la jena artikolo.

Mi ekpraktikis la Raĝa-Jogon de la Braĥmo-Kumaroj kiam mi estis 12-jara. Post pli ol dek jaroj mi ekkonscias ke, kvankam apenaŭ adoleskantino, mi elektis tiun ĉi vivmanieron per mia tuta koro kaj, mi devus diri, per mia tuta animo. Ĉar elektante tiun ĉi spiritan vojon, mi donis al mia vivo tute apartan valoron kies gravecon mi tiam ankoraŭ ne komprenis.

### **Povo de la ideoj**

Esti Braĥmo-Kumaro signifas kredi je la spirita fundamento de la esto. Tio estas esti idealisto : ne en la senco laŭ kiu ni kutime komprenas tion, kiel vanan vorton, sinoniman de utopio – sed pli precize laŭ la propra senco de la vorto. Esti idealisto signifas kredi je la forto de la ideoj, kredi ke niaj ideoj povas ŝanĝi la mondon. La ideoj enhavas forton, potencon. La meditado de la BK-a Raĝa-Jogo celas montri al ni kiel pozitive uzi tiun ĉi povon, kiu ofte returniĝas kontraŭ ni. En mia infanaĝo, idealo (aŭ ĉu ne temis pri memoro ?) posedis min : transformi min kaj povi forpuŝi ĉiun egoistan kialon ĉe la radiko de miaj agoj.

La instruo de la Braĥmo-Kumaroj asertas ke **ne estas hazardo**. Tiel, mi kredas ke ne estas dispozicio ĉe iu pro hazardo, same kiel ne estas vokiteco pro hazardo. Alidirite, tute same kiel la fizikaj leĝoj regas nian mondon, tiel same ekzistas leĝoj kiuj regas la spiritan mondon. Kion mi komprenas per spirita mondo, tio estas tre simpla ; tio koncernas tion kio rilatas kun la mondo de la penso. La homaj rilatoj enestas tiun ĉi difinon, ĉar tiuj ĉi estas bazitaj sur la penso. Ili ĉiam havas kiel originon la homajn pensojn.

Por diri tion ankoraŭ alimaniere mi faros simplan demandon : kiel ni, kiuj kredas je spirita fundamento de la homaro, povus pensi ke niaj agoj (per agoj mi komprenas penson, parolon, agadon) estas senkialaj ? Tio ĉi signifus ke mi ne respondecas pri ili. Nu, oni povas distingi, sekvante la filozofojn, la homon disde la objekto, la spiritan mondon disde la materia, per tio ke la homo posedas la eblecon elekti, kaj la objekto ne. Tio ĉi signifas do ke ni estas respondecaj pri niaj agoj kaj ĉefe pri niaj pensoj ĉar la penso estas la radiko de niaj agoj.

### **Kion tio signifas konkrete ?**

Se mi senĉese lamentas pri mia sorto mi bone scias ke nenio pozitiva eliros el tio kaj ke mi ne kapablos resuprengrimpi la deklivon. Male, se mi havas firman volon fari ion por mia bono aŭ la bono de la aliulo tiam mi kapablas haltigi la fluon de miaj senefikaj pensoj kaj reale fari ion pozitivan. Unuvorte mi kapablas ĉesigi tiun ĉi modernan plagon, la deprimon. Kaj plie, kiam mi deprimiĝas, la aliuloj sentas tion kaj siavice estas influataj de mia sinteno (negativa aŭ pozitiva). Miaj pensoj efikas ne nur sur min sed ankaŭ sur la aliulon kaj sur mian ĉirkaŭaĵon. Ĉar la kvalito de niaj pensoj transformas la atmosferon en kiu ni vivas, kaj ni kutime spertas la retroefikon de la pensoj kiujn ni elsendis. Do esti respondeca pri miaj pensoj signifas unue esti kapabla decidi pri la direkto de mia vivo.

Due tio signifas ke mi povas akuzi nek iun nek ion : nek Dion, nek la cirkonstancojn de miaj nunaj aŭ pasintaj malfeliĉoj.

Trie, mi devas akcepti la pasinton tia kia ĝi estas [aŭ fakte estis !] kaj "meti finan punkton" al tiu ĉi pasinto [t.e. firme limigi ĝin], eĉ ĵusa, por povi tiri el ĝi la instruojn kaj provi transformi ĝin. Eblas progresi se oni kontrolas sin. Tiel la Braĥmo-Kumaroj ĉiuvespere faras bilancon pri sia tago. Ekzemplo de punktoj inkludataj en tia bilanco : ĉu mi okazigis suferon al iu hodiaŭ ? aŭ ĉu mi spertis suferon ? Nur mallongan komenton pri la dua punkto : Se ŝajnas al ni relative facile ne okazigi suferon al iu, ne estas tiel simple ne sperti mem suferon ; sed ankaŭ tio ĉi estas nia respondeco rilate la aliulojn, nian proksiman ĉirkaŭaĵon ...kaj ankaŭ la mondon.

### **Meditado**

Kvare, kion mi povas fari por transformi min kaj por transformi la mondon ? Meditadi.

Meditadi signifas unue situigi min en la konscio pri kio mi estas. Mi estas animo, nemateria estaĵo kiu pensas, kiu decidas kaj kiu estas dotita per personeco. Ĉiuj ĉi funkcioj apartenas propre al mi ĉar ili vere determinas kio mi hodiaŭ estas kaj morgaŭ estos. Meditadi estas krei la internan silenton, tio estas la silenton en la pensoj.

## Al pozitiva personeco

Fakte ne temas pri ĉesigi la pensojn, sed selekti iujn, elekti siajn pensojn. Meditadi signifas do esti kreanto de pozitiva personeco. Tamen, lerni esti pozitiva foje estas multe pli komplekse, ĉar mi devas kalkuli kun la pens-kutimoj kiujn mi kreis, tio kion ni nomas personeco. Ekzemple se mi kutimas esti klaĉanto mi kreas en mi tiun trajton de personeco en formo de emo paroli pri la aliuloj kaj ĉefe pri iliaj malbonaĵoj. La nura intelekta ekkonscio de tiu ĉi malbonaĵo ne sufiĉas por transformi ĝin, ĉar malgraŭvole tiu ĉi kutimo reaperos. Fakte mi estas respondeca pri tiu karakterotrajto kaj pri la turmentoj kiujn ĝi okazigas al mi, ĉar mi nenion faris por demeti ĝin kiam mi ankoraŭ povis fari tion.

Kiel mi povas fari por demeti tiun malbonan kutimon? Konektante min al fonto de energio, al animo kies personeco estas tute pura: Dio. Nur Dio povas purigi min ĉar li estas mem tute pura. En meditado, per memorado pri li mi povas sperti ĉiujn jenajn kvalitojn: amo, feliĉo, povo... La akiroj ne estas limigitaj ĉar Dio estas la Oceano de ĉiuj povoj kaj de ĉiuj virtoj.

## Konklude

La kontribuo de la Brahma-Kumaroj al la inter-religia afero. La spirita universitato de la Brahma-Kumaroj estas unu el la plej aktivaj spiritaj organizoj sur la internacia kampo. Ĝi laboras en proksima harmonio kun UNO kies idealoj similas la ĝiajn. Ĝi laboras por antaŭenigi la kunlaboradon kaj la unuecon inter la homoj, kiuj ajn estas iliaj raso, lingvo, kulturo, origino. Ĝia celo estas la realigado de pli bona mondo per ekkonsciiĝo pri la spiritaj valoroj kiuj troviĝas en ĉiu homo. Finfine ĝi estas la ununura internacia institucio estrata de virinoj.

Ekzemplon de agado de Brahma-Kumaroj: ĉiujare estas organizata ĉe la sidejo de la institucio en Monto Abu (Bharato) granda internacia konferenco. Tiu kiu okazis en 1995 havis kiel temon: «*La valoroj por pli bona mondo*».

Ĉiun trian dimanĉon de ĉiu monato, ĉiuj Brahma-Kumaroj meditadas favore al la paco en la mondo, dum unu horo (de 17-a <sup>1</sup>/<sub>2</sub> ĝis 18-a <sup>1</sup>/<sub>2</sub>). Tiuj kunvenoj de meditado estas malfermitaj al ĉiuj kaj ĉiu povas alporti sian ŝtonon por la starigo de la paco, laŭ la maniero kiun li deziras.

1/ Sanskrita vorto kiu signifas infanon aŭ heredontan princon. *Raĝa* signifas reĝon.

2/ Eble estas tiu provo kiu decidigis lin verki artikolon titolitan «*Universala Spirita Universitato*» por numero de *Kontakto* dediĉita al Bharato (en 1988?).

3/ Pri ĝi vidu n-ron 14 p.5 (kaj ĉe an prelegon en 15 p.3).

## Prenu la Tempon

Prenu la Tempon **PENSI...**

*Tio estas la fonto de povo.*

Prenu la Tempon **LUDI...**

*Tio estas la sekreto de ĉiama juneco.*

Prenu la Tempon **LEGI...**

*Tio estas la aliro al saĝeco.*

Prenu la Tempon **PREĜI...**

*Tio estas la plej granda surtera potenco.*

Prenu la Tempon **AMI** kaj

**ESTI AMATA...**

*Tio estas donaco de Dio.*

Prenu la Tempon **ESTI AMIKA...**

*Tio estas la vojo al feliĉo.*

Prenu la Tempon **RIDI...**

*Tio estas la muziko de la animo.*

Prenu la Tempon **DONACI...**

*Vivo estas tro mallonga por esti egoista.*

Prenu la Tempon **LABORI...**

*Tio estas la prezo de sukceso.*

Prenu la Tempon **KOMPATI...**

*Tio estas ŝlosilo al la enkora ĉielo.*

Anonima anglalingva teksto trovita en Tromsø (Nord-Norvegio), en ŝtuparejo de studenthejmo kie loĝis franca amiko, red. de *VERDire*: *Ekologiisma gazeto en esperanto*. (Informoj pri aŭtoro bonvenaj. Ĉu jam temas pri traduko?)



## *Take Time*

Take Time to **THINK...**  
*It is the source of power.*

Take Time to **PLAY...**  
*It is the secret of perpetual youth...*

Take Time to **READ...**  
*It is the fountain of wisdom.*

Take Time to **PRAY...**  
*It is the greatest power on earth*

Take Time to **LOVE** and  
**BE LOVED...**  
*It is a God-given privilege.*


Take Time to **BE FRIENDLY...**  
*It is the road to happiness.*

Take Time to **LAUGH...**  
*It is the music of the soul*

Take Time to **GIVE...**  
*It is too short a day to be selfish.*

Take Time to **WORK...**  
*It is the price of success*

Take Time to do **CHARITY...**  
*It is the key to heaven.*



# Jogosutro de Patañjali :

व्याधिस्त्यानसंशयप्रमादालस्याविरतिभ्रान्तिदर्शनालब्ध-

भूमिकत्वानवस्थितत्वानि चित्तविक्षेपास्तेऽन्तरायाः ।

दुःखदौर्मनस्याङ्गमेजयत्वश्वासप्रश्वासा विक्षेपसहभुवः ।

तत्प्रतिषेधार्थमेकतत्त्वाभ्यासः ।

vjādhi-stjāna-samśaja-pramādālasjāvīrati-bhrānti-darśanālabdha-  
bhūmikatvānavasthitatvāni citta-vikṣepāste 'ntarājāh / [30]

duḥkha-dāūr-manasjāngam-eḡaja-tva-śvāsa-pra-śvāsā vi-kṣepa-saha-bhuvah / [31]  
tat-pratiśedhārtham eka-tat<t>vābhjāsah<sup>1</sup> / [32]

अथ केऽन्तराया ये चित्तस्य विक्षेपाः? पुनस्ते कियन्तो वेति? व्याधिस्त्यानसंशयप्रमादालस्याविरतिभ्रान्तिदर्शनालब्धभूमिकत्वानवस्थितत्वानि चित्तविक्षेपास्तेऽन्तरायाः । नवान्तरायाश्चित्तस्य विक्षेपाः । सहते चित्तवृत्तिभिर्भवन्ति । एतेषामभावे न भवन्ति । पूर्वोक्ताश्चित्तवृत्तयः । तत्र व्याधिर्धातुरसकरणवैषम्यम् । स्त्यानमकर्मण्यता चित्तस्य । संशय उभयोर्कोटिस्पृग्विज्ञानं स्यादिदमेवं नैवं स्यादिति । प्रमादः समाधिसाधनानामभावनम् । आलस्यं कायस्य चित्तस्य च गुस्त्वादप्रवृत्तिः । अविरतिश्चित्तस्य विषयसंप्रयोगात्मा गर्द्धः । भ्रान्तिदर्शनं विपर्ययज्ञानम् । अलब्धभूमिकत्वं समाधिभूमेरलाभः । अनवस्थितत्वं यत्त्वानायां भूमौ चित्तस्याप्रतिष्ठा । समाधिप्रतिलम्भे हि सति तदवस्थितं स्यादिति । एते चित्तविक्षेपा नव योगमला योगप्रतिपक्षा योगान्तराया इत्यभिधीयन्ते ॥ ३० ॥

दुःखदौर्मनस्याङ्गमेजयत्वश्वासप्रश्वासा विक्षेपसहभुवः । दुःखमाध्यात्मिकमाधिभौतिकमाधिदैविकं च । येनाभिहताः प्राणिनस्तदुपघाताय प्रयतन्ते तद्दुःखम् । दौर्मनस्यमिच्छाविघाताच्चेतसः क्षोभः । यदङ्गान्येजयति कम्पयति तदङ्गमेजयत्वम् । प्राणो यद् बाह्यं वायुमाचामति स श्वासः । यत्कौष्ठ्यं वायुं निःसारयति स प्रश्वासः । एते विक्षेपसहभुवः, विक्षिप्तचित्तस्यैते भवन्ति । समाहितचित्तस्यैते न भवन्ति ॥ ३१ ॥

अथेते विक्षेपाः समाधिप्रतिपक्षास्ताभ्यामेवाभ्यासवैराग्याभ्यां निरोद्धव्याः । तत्राभ्यासस्य विषयमुपसंहरन्निदमाह — तत्प्रतिषेधार्थमेकतत्त्वाभ्यासः । विक्षेपप्रतिषेधार्थमेकतत्त्वावलम्बनं चित्तमभ्यसेत् । यस्य तु प्रत्यर्थनियतं प्रत्ययमात्रं क्षणिकं च चित्तं तस्य सर्वमेव चित्तमेकाग्रं, नास्त्येव विक्षिप्तम् । यदि पुनरिदं सर्वतः प्रत्याहृत्यैकस्मिन्नर्थे समाधीयते तदा भवत्येकाग्रमित्यतो न प्रत्यर्थनियतम् ।

atha ko 'ntarājā je cīttasja vi-kṣepāh ? punas te kijanto veti ? ( . . . ) navāntarājāś cīttasja vi-kṣepāh / sahājte cīttavri(i)ttibhir bhavanti / eteśām abhāve na bhavanti / pūrvoktāś cīttavri(i)ttajah / tatra vjādhir dhātu-rasa-karana-vājsamjam / stjānam a-karmanja-tā cīttasja / samśaja ubhaja-koti-spr(i)g-vi-ḡñānam sjād idam evam nājvam sjād iti / pramādah samādhi-sādhanānām a-bhāvanam / ālasjam kajasja cīttasja ca guru-tvād a-pra-vri(i)ttih / a-viratis cīttasja viśaja-sam-prajogātmā garddhah / bhrānti-darśanam vi-parjaja-ḡñānam / a-labdha-bhūmika-tvam samādhi-bhūmer-a-lābhah / an-avasthita-tvam jal-labdhatjām bhūmāū cīttasjāpratiśthā / samādhi-prati-lambhe hi sati tad avasthitam sjād iti / ete cīttavikṣepā nava joga-malā joga-prati-pakśā jogāntarājā itj abhidhijante // 30 //

duḥkham ādhj-ātmikam ādhi-bhāūtikam ādhi-dājvikam ca / jenābhihatāh prāninas tad-upa-ghātāja pra-jatante tad duḥkham / dāūrmanasjam icchā-vi-ghātāc cetasah kśobhah / jad angānj-eḡajati kampajati tad angam-eḡajatvam / prāno jad bāhjam vājum ācāmati sa śvāsah / jat kāūsthjam vājum nih-sārajati sa pra-śvāsah / ete vi-kṣepa-saha-bhuvah, vi-kṣipta-cīttasjājte bhavanti / smāhita-cīttasjājte na bhavanti // 31 //

athājte vi-kṣepāh samādhi-prati-pakśās tābhjām evābhjāsa-vājrāḡjābhjām ni-roddhavjāh / ( . . . ) / vi-kṣepa-prati-śedhārtham ekatattvāvalambanam cīttam abhjaset / jasja tu pratj-artha-nijatam pratjajamātram kśanikam ca cīttam tasja sarvam eva cīttam ekāgram, nāstj eva vi-kṣiptam / jadi punar idam sarvatah pratj-āhr(i)tjājkasminn-arthe samādhijate tadā bhavatj ekāgram itj ato na pratj-artha-nijatam ( . . . ) // 32 //



# I – Samâdhi-ĉapitro (sekvo)

( *Spirita sintezo de eŭroplingvaj tradukoj* )

30. Malsaneco, malkuraĝeco, dubo, mensa malekvilibro, mallaboremo, malmodereco, erara juĝemo, malkapablo konkretigi kion oni planas, aŭ tro ofta ŝanĝemo pri projektoj, jen la obstakloj kiuj disjetas la konscion.
31. Sufero, angoro, incitiĝemo, akcelita spirado akompanas tiun mensan disiĝon.
32. Por malebligi tion, necesas centriĝi sian praktikon al ununura principo ĉiun fojon.

( *Redaktora laŭvorta traduko el sanskrito* )

30. Malbonfarto, malvilgleco, dubo, eraro, inerteco, ĝuemego, iluzio, neatingo de la ŝtupo [de samadhio], nestabileco, tiuj ĉi distriĝoj de la menso estas la obstakloj.
31. Sufero, malbona mensostato, korpo-tremado, enspiro, elspiro okazas kune kun la distriĝoj.
32. Cele al ilia forpuŝo [estas] la trejniĝo de l'ununura realo<sup>1</sup>.

## Sanskrita komentario de Vjaso

30. « Nu, kiuj estas la obstakloj kiuj estas distriĝoj de la menso ? aŭ, ankoraŭ, kiom ili estas ? »

– (...) Naŭ estas la obstakloj, distriĝoj de la menso. Tiuj ĉi okazas kune kun la mens-turniĝoj. En neokazo de tiuj ĉi ili ne okazas. Oni jam parolis pri la mens-turniĝoj.<sup>2</sup>

Tie *malbonfarto* [estas] malordo de la humoroj<sup>3</sup>, [korpo]fluaĵoj [aŭ] sensorano(j). *Malvigleco* [estas] neagemo de la menso. *Dubo* [estas] konsidero alvenanta al ambaŭ finoj de alternativo [sen povi decidi inter :] «tio estu tiel, [aŭ] ne estu tiel». *Eraro* [estas] la malesto [de ĝusta percepto] de la rimedoj por la absorbiĝo. *Inerteco* [estas] neprogreso pro pezeco de la korpo aŭ de la menso. *Ĝuemego* [estas] avido de la menso, kies naturo [estas] alligiteco al la sensaj plezuroj. *Iluzio* [estas] kono [bazita sur] miskompreno. *Neatingo de la ŝtupo* [estas] neatingo de la samadhi-ŝtupo. *Nestabileco*, tio estas nefirmebaziteco sur la atingita ŝtupo, ĉar [nur] se estas atingado de la absorbiĝo tio estus stabileco.

Tiuj mensodistriĝoj nomiĝas la 9 malpuraĵoj de jogo, kontraŭaĵoj de jogo, obstakloj de jogo.

31. *Sufero* estas spiritdevena, fizika aŭ didevena<sup>4</sup>. Kion, de ĝi atakitaj, la vivantoj<sup>5</sup> strebas forigi, tio estas sufero. *Malbona mensostato* estas konfuzo de la spirito pro repuŝado<sup>6</sup> de deziro. Kio tremigas, skuetas la membrojn, tio estas *korpotremado*. Spiro, kiam ensorbas eksteran aeron, [estas] *enspiro*, kiam enventran [t.e. enpulman] aeron elblovas, [estas] *elspiro*.

Ili okazas kune kun la distriĝoj, leviĝas el distrita menso ; ili ne leviĝas el absorbita menso.

32. Nu, tiuj distriĝoj, kontraŭaĵoj de la absorbiĝo, [estas] haltigendaj per ĝuste tiuj ĉi du : trejniĝo [kaj] senpasieco (...) Cele al la forpuŝo de la distriĝoj oni trejnu la menson al fiksiĝo en la ununura reala stato. Nu, tiu kies menso estas tute koncentrita sur ĉiu objekto, pura konscio kaj fulma, ties vere tuta menso, unupinta, vere ne estas distrita. Se cetere, retirinte ĝin el ĉio, li absorbiĝas en unu objekto, [ankaŭ] tiam ĝi estas unupinta, [sed] tiel ĉi ne sur ĉiu objekto estas koncentrita lia [menso] (...)

### Notoj

1/ Aŭ : « unuiĝeco-trejniĝo » se *ekatatva* anstataŭ *ekatattva*\*. Tiam temus pri tre praktika trejniĝo, ek-e laŭ nuntempa komentarianto, Sŭamio Sadānand Sarasvatī : « fiksi la menson sur unu objekto » (en *Yogānuśāsanam*, I,32, Haarlem (NL), 1976).

\* Sed tiu ĉi formo troviĝas ankaŭ en la eldono de la sanskrita komentario de Vjaso : tial ni preferis ĝin.

2/ Vidu sutrojn 2 kaj 4-12 en n-ro 16 p.7, kiujn oni prefere anstataŭigu per : 2. [La celo de] jogo estas la haltigo de la turniĝoj de la *menso* ; 4. [Lia] simileco al la *turniĝoj* estas kroma. 5. La *turniĝoj* estas kvinspecaj, turmentaj kaj neturmentaj... kaj 12. Ilia haltigo [de la *turniĝoj*] estas en trejniĝo kaj senpasieco.

3/ Kutime tri : galo, « flegmo » kaj « vento ».

4/ Sed *deva*, el kiu tiu ĉi adjektivo *ādhidājvika* devenas, ne signifas ununuran « Dio » sed jam malpli malĝuste *diaĵon 1.* de PIV ; la adjektivo eĉ povas signifi « devenanta de la influo de la atmosfero, aŭ de la planedoj » (laŭ Monier-Williams, *Sanskrit-English dict.*).

5/ Laŭvorte : *spir-havantoj*.

6/ Aŭ : *obstaklo al.*

मैत्रीकरुणामुदितोपेक्षाणां सुखदुःखपुण्यापुण्यविषयाणां

भावनान्तश्चित्तप्रसादनम् ।

प्रच्छर्दनविधारणाभ्यां वा प्राणस्य ।

विषयवती वा प्रवृत्तिरुत्पन्ना मनसः स्थितिनिबन्धिनी ।

विशोका वा ज्योतिष्मती । वीतरागविषयं वा चित्तम् ।

स्वप्ननिद्राज्ञानालम्बनं वा । यथाभिमतध्यानाद्वा ।

mâjtrî-karunâ-muditopekâsânâm sukha-dukhâ-punjabunja-viśajânâm  
bhâvanâtâs citta-prasâdanam / [33]

pra-cêhardana-vi-dhâranâbhjâm vâ prânasja / [34]

viśaja-vatî vâ pra-vr(i)ttir ut-pannâ manasah sthiti-nibandhinî / [35]

vi-śokâ vâ g̃jotiś-matî / [36]

vîta-râga-viśajam vâ cîttam / [37]

svapna-nidrâ-g̃nânâlambanam vâ / [38]

jathâbhimata-dhjânâd vâ / [39]

यस्य चित्तस्यावस्थितस्येदं शास्त्रेण परिकर्म  
निदिश्यते तत्कथम् ? मैत्रीकरुणामुदितोपेक्षाणां  
सुखदुःखपुण्यापुण्यविषयाणां भावनान्तश्चित्तप्रसाद-  
नम् । तत्र सर्वप्राणिषु सुखसंभोगापन्नेषु मैत्री  
भावयेत्, दुःखितेषु करुणाम्, पुण्यात्मकेषु मुदिताम्,  
अपुण्यशीलेषूपेक्षाम् । एवमस्य भावयतः शुक्लो धर्म  
उपजायते । ततश्च चित्तं प्रसीदति । प्रसन्नमेकाग्रं  
स्थितिपदं लभते ॥ ३३ ॥

प्रच्छर्दनविधारणाभ्यां वा प्राणस्य । कौष्ठ्यस्य  
वायोर्नासिकापुटाम्यां प्रयत्नविशेषाद्भ्रमनं प्रच्छर्दनं  
विधारणं प्राणायामस्ताभ्यां वा मनसः स्थितिं संपा-  
दयेत् ॥ ३४ ॥

विषयवती वा प्रवृत्तिरुत्पन्ना मनसः स्थिति-  
निबन्धिनी । नासिकाग्रे धारयतोऽस्य या दिव्यगन्ध-  
संवित्सा गन्धप्रवृत्तिः । जिह्वाग्रे रससंवित् । तालुनि  
रूपसंवित् । जिह्वामध्ये स्पर्शसंवित् । जिह्वामूले  
शब्दसंविदित्येताः प्रवृत्तय उत्पन्नाश्चित्तं स्थितौ  
निबन्धन्ति, संशयं विधमन्ति, समाधिप्रज्ञायां च  
द्वारीभवन्तीति ।

एतेन चन्द्रादित्यग्रहमणिप्रदीपरश्म्यादिषु प्रवृत्ति-  
रुत्पन्ना विषयवत्येव वेदितव्या ।

यद्यपि हि तत्तच्छास्त्रानुमानाचार्योपदेशैरव-  
गतमर्थतत्त्वं सद्भूतमेव भवति, एतेषां यथाभूतार्थ-  
प्रतिपादनसामर्थ्यात्तथापि यावदेकदेशोऽपि कश्चिन्न  
स्वकरणसंवेद्यो भवति तावत्सर्वं परोक्षमिवापवर्गा-  
दिषु सूक्ष्मेष्वर्थेषु न दृढां बुद्धिमुत्पादयति । तस्मा-  
च्छास्त्रानुमानाचार्योपदेशोपोद्बलनार्थमेवावश्यं  
कश्चिदर्थविशेषः प्रत्यक्षीकर्तव्यः । तत्र तदुपदिष्टार्थक-  
देशप्रत्यक्षत्वे सति सर्वं सूक्ष्मविषयमपि आ अप-  
वर्गाच्छद्ध्यते । एतदर्थमेवेदं चित्तपरिकर्म निदिश्यते ।  
अनियतासु वृत्तिषु तद्विषयायां वशीकारसंज्ञायामु-  
पजातायां समर्थं स्यात्तस्य तस्यार्थस्य प्रत्यक्षीकरणा-  
येति । तथा च सति श्रद्धावीर्यस्मृतिसमाधयोऽस्या-  
प्रतिबन्धेन भविष्यन्तीति ॥ ३५ ॥

विशोका वा ज्योतिष्मती । प्रवृत्तिरुत्पन्ना मनसः  
स्थितिनिबन्धिन्यनुवर्तते । हृदयपुण्डरीके धारयतो  
या बुद्धिसंविद् बुद्धिसत्त्वं हि भास्वरमाकाशकल्पं तत्र  
स्थितिवंशारद्यात्प्रवृत्तिः सूर्येन्दुग्रहमणिप्रभारूपाकारेण

विकल्पते । तथास्मितायां समापन्नं चित्तं निस्तरङ्ग-  
महोदधिकल्पं शान्तमनन्तमस्मितामात्रं भवति ।  
यत्रेदमुक्तम्—'तमणुमात्रमात्मानमनुविद्यास्मीति एवं  
तावत्संप्रतिजानीत इति ।'

एषा द्वयी विशोका विषयवती अस्मितामात्रा च  
प्रवृत्तिर्ज्योतिष्मतीत्युच्यते यया योगिनश्चित्तं  
स्थितिपदं लभत इति ॥ ३६ ॥

वीतरागविषयं वा चित्तम् । वीतरागचित्तालम्ब-  
नोपरक्तं वा योगिनश्चित्तं स्थितिपदं लभत इति  
॥ ३७ ॥

स्वप्ननिद्राज्ञानालम्बनं वा । स्वप्नज्ञानालम्बनं  
वा निद्राज्ञानालम्बनं वा तदाकारं योगिनश्चित्तं  
स्थितिपदं लभत इति ॥ ३८ ॥

यथाभिमतध्यानाद्वा । यदेवाभिमतं तदेव ध्यायेत् ।  
तत्र लज्जस्थितिकमन्यत्रापि स्थितिपदं लभत इति  
॥ ३९ ॥

jasja cîttasjâvasthitasyedam sâstrena pari-karma nir-  
diśjate tat katham ? (...) / tatra sarva-prâniśu sukha-sam-  
bhogâpanneśu mâjtrîm bhâvajet, dukhiteśu karunâm,  
punjâtmakeśu muditâm, apunja-śileśûpekâsâm / evam asja  
bhâvajatah śuklo dharmâ upa-gâjate / tataś cê cîttam pra-  
sîdati / pra-sannam ekâgram sthiti-padam labhate // 33 //

kâûsthjasja vâjor nâsikâ-putâbhjâm pra-jatna-viśeśâd  
vamanam pra-cêhardanam vi-dhâranam prânâjâmas tâbhjâm  
vâ manasah sthitim sam-pâdajet // 34 //

nâsikâgre dhârajato 'sja jâ divja-gandha-samvit sâ  
gandha-pra-vr(i)ttih / (...) etâh pra-vr(i)ttaja ut-pannâs  
cîttam sthitâû nibadhnanti\*, samśajam vi-dhamanti, samâdhi-  
pra-g̃nâjâm cê dvârî-bhavantîti / (\*erare por nibandhanti)

etena candrâditja-graha-mani-pradîpa-raśmjâdiśu pra-  
vr(i)ttir ut-pannâ viśaja-vatj eva veditavjâ /

jadj api hi tat-ta-cê-cêhâstrânumânâcârjopadeśâjr-  
avagatam-ârtha-tattvam sad-bhâtam eva bhavati, eteśâm  
jathâbhûtârtha-prati-pâdana-sâmarthjât tathâpi jâvad eka-  
deśo 'pi kaścin na sva-karana-samvedjo bhavati tâvat  
sarvam parokśam ivâpavargâdiśu sūkśmeśvartheśu na  
dr(i)dhâm buddhim ut-pâdajati / tasmâc  
cêhâstrânumânâcârjopadeśopodbalanârtham evâvaśjam  
kaścid artha-viśeśah pratjakśî-kartavjah / tatra tad-

upadiśârthâjka-deśa-pratjakśa-tve sati sarvam sūkśa-  
viśajam api â apavargâcêhraddhîjate / etad-artham  
evedam citta-pari-karma nir-diśjate / a-nijatâsu vr(i)ttiśu  
tad-viśajâjâm vaśî-kâra-sam-g̃nâjâm upa-gâtâjâm sam-  
artham sjât tasja tasjârthasja pratjakśî-karanâjeti / tathâ cê  
sati śraddhâ-vîrja-smr(i)ti-samâdhajo 'sjâpratibandhena  
bhaviśjantîti // 35 //

pra-vr(i)ttir ut-pannâ manasah sthiti-nibandhinj  
anuvartate / hr(i)daja-pundarîke dhârajato jâ buddhi-  
samvid buddhi-sattvam hi bhâsvaram âkâśa-kalpam tatra  
sthiti-vâjśârâdjât pra-vr(i)ttih sūrjendu-graha-mani-prabhâ-  
rûpâ-kârena vikalpate / tathâsmitâjâm sam-â-pannam  
cîttam nis-taranga-mahodadhi-kalpam sântam an-antam  
asmitâ-mâtram bhavati / jatredam uktam: "tam anu-mâtram  
âtmânânam anuvîdjâsmîti evam tâvat sampratigânîta iti /"

eśâ dvajî vi-śokâ viśaja-vatî asmitâ-mâtrâ cê pra-vr(i)ttir g̃jotiś-  
matîj ucjate jajâ joginaś cîttam sthiti-padam labhata iti // 36 //

vîta-râga-cîttâlambanoparaktam vâ joginaś cîttam  
sthiti-padam labhata iti // 37 //

svapna-g̃nânâlambanam vâ nidrâ-g̃nânâlambanam vâ  
tad-â-kâram joginaś cîttam sthiti-padam labhata iti // 38 //

jad evâbhimatam tad eva dhjâjet / tatra labdha-  
sthitikam anjatrâpi sthiti-padam labhata iti // 39 //

33. Amikeco, kompatemo, gajo klarigas la menson. Tiu sinteno estas utiligenda sammaniere en feliĉo kiel en malfeliĉo, koncerne egale kion ni ŝatas kaj kion ni malŝatas.
34. Por kontraŭstari la mensan distriĝon, ankaŭ taŭgas kontrolado de la spirado, reguligante enspiron kaj elspiron, kaj per retenemo de la spiro.
35. Mensan stabilecon ankaŭ ebligas eksperimento pri la manifestiĝo de la sentebla mondo.
36. Aŭ per spertado de lumoplena kaj serena stato. 37. Aŭ per mensa direktiĝo al persono kiu efektivigis sendezirostaton.
38. Aŭ atinginte konon entenatan en dormo kaj sonĝo. 39. Aŭ per meditado pri elektita favora temo.

( *Redaktora laŭvorta traduko el sanskrito* )

33. Purigo de la menso venas de la naskado de amika bonvoleco, kompatemo, ĝoja simpatio, neatentemo, al agrablaj, malagrablaj, bonaj, malbonaj objektoj [respektive<sup>1</sup>];
34. aŭ [ĝi venas] de ellasetado [kaj] haltigo de la spirado.
35. Aŭ, stabilecon de la menso kaŭzas el[interne] leviĝanta impresio, simila al [sensaco vekita de] objekto;
36. aŭ senafliktiga lumoplena [elinterne leviĝanta impresio]; 37 aŭ menso dediĉita al senafekciulo,
38. aŭ apogiĝanta sur la kono de sonĝo kaj dormo; 39 aŭ el kontemplado de io ajn laŭplaĉe.

### Sanskrita komentario de Vjaso

33. *De tiu stabila menso, kiel la traktatoj priskribas tiun ĉi preparon ?* (...) Ĉi tie, al ĉiuj vivantoj<sup>2</sup> kiuj atingis la plenan ĝuon de plezuro, oni nasku amikan bonvolecon; al la malfeliĉaj, kompaton; al la virtuloj ĝojan simpatian; al la malbonkondutojn, neatentemon. Al tiu ĉi kiu tiel [= tion] naskadas, luma naturo kromnaskiĝas. Kaj sekve la menso puriĝas. Purigita, [ĝi fariĝas] unupinta, [kaj] ĝi atingas staton de stabileco.

34. *Ellasetado* [estas] aparte apenaŭ eligado de la enventra aero tra la naztrouj; *haltigo* [estas] reteno de la spirado. [T.e. :] aŭ per tiuj ĉi du oni realigu la stabilecon de la menso.

35. Kio por tiu kiu koncentriĝas sur la pinto de sia nazo, [estas] percepto de mirinda parfumo, tio [fakte estas] impresio de parfumo [sen ekstera objektiva kaŭzo] (...)

Tiuj el[interne] leviĝantaj impresoj ligas la menson al stabileco, forblovas la dubon kaj estas la pordo al sperto de absorbiĝo.

Pro tio ĉi, en la luno, la suno, planedo, juvelo, lumo, radio ktp., leviĝanta impresio nur simila al [la sensaco vekita de] la objekto estas spertenda.

Fakte, kvankam la naturo de la respektivaj objektoj lernataj per la instruoj de la traktatoj, de la indukto kaj de la spirita majstro, estas veraĵoj ja pro ilia kapableco malkovrigi aĵojn kongruajn kun la realo [jam konata de la lernanto], tamen, kiom longe almenaŭ unu ero ne fariĝas perceptebla per sia(j) propra(j) senso(j), tiom longe ĉio [(r)estas] kiel nekoncepteblaĵo [io trans la sensa kampo] [kaj] ne produktas firman komprenon pri subtilaj realaĵoj kiel la liberiĝo ktp.

Pro tio, ĝuste cele al konfirmado de la instruoj de la traktatoj, de la indukto kaj de la spirita majstro, necesas ke iu speco de tiaj objektoj fariĝu perceptebla. Ĉi-kaze, ĉar estas percepto de unu ero de la objekto instruita de ili, oni kredas ankaŭ je la tuta subtila kampo ĝis [= inkluzive de] la liberiĝo. Ĝuste cele al tio ĉi estas ĵus priskribita la preparo de la menso. Kiam naskiĝas harmonio pro submeto de la neregitaj [mensaj] turniĝoj

en ties kampoj, estas ebleco percepti la respektivan objekton de ĉiu [instruo]. Kaj se tiel estas, li senimplike akiros fidon, heroecon, atenton kaj absorbiĝon.

36. [*Aŭ senafliktiga lumoplena*] daŭrigas [kaj rilatas al] el[interne] leviĝanta impresio (*kaŭzas stabilecon de la menso*). La percepto de la spirito por kiu koncentriĝas sur la [blanka] lotuso de la koro, [estas] ĝuste la esenco de la spirito, brila kvazaŭ la etero. La impresio, [kiu venas] el la sperto de stabileco tie [t.e. en la koro], ŝanĝiĝas kreante lumegajn formojn de sunoj, lunoj, steloj, juveloj... Same, la menso kiu alvenas al la "*mi estas*"-eco<sup>3</sup> fariĝas nur pura "*mi estas*"-eco serena, senlima kvazaŭ senonda oceano. Kaj pri tio estas dirite:

« *Malkovrinte, atomgrandan, la animon,  
tiel li tuj scias – prave do – "mi estas"* ».

Tiu ĉi duspeca senafliktiga impresio, simila al [sensaco vekita de] objekto kaj de pura "*mi estas*"-eco, estas nomita "*la lumoplena*"; kaj per ĝi la menso de la jogano atingas la staton de stabileco.

37. Influita de apogiĝo sur menso senafekcia, la menso de la jogano « atingas la staton de stabileco ».

38. Aŭ apogiĝanta sur la kono de sonĝo aŭ apogiĝanta sur la kono de dormo, havanta ties [ĉi ?] aspekton, la menso de la jogano « atingas la staton de stabileco ».

39. Ĝuste kio estas laŭ sia plaĉo, ĝuste tion oni kontemplu. En tio atinginte stabilecon, ankaŭ en io [ajn] alia oni « atingas la staton de stabileco ».

1/ Nur pro la komentario; oni povus ankaŭ kompreni *neatentemo al agrableco aŭ malagrabableco, boneco aŭ malboneco de la objektoj*. T.e. ke la objektoj karakterizitaj de la *dvandva*-oj (paroj) de malaj adjektivoj, agrabla/malagrabla, bona/malbona, rilatus (kiel PAG-aj *objektivaj suplementoj*) nur al la lasta vorto de la serio kaj ne respektive al ĉiu el la kvar. Des pli ke ankaŭ en aliaj tekstoj, ekzemple en la budhista *Kārandavyūha*, ekzistas la nur trivorta kunmetaĵo *majtrī-karunā-mudita*.

2/ Laŭvorte: spirhavantoj; do ne nur homoj.

3/ T. e. nedueco, do ia monismo sed tute ne kiel filozofia sistemo, intelekta, sed kiel viva ("mistika") sperto de ĝenerala fandiĝo kie nenio ekzistas krom mi ĉar mi estas ĉio kaj ĉio estas mi; mallonge: nur mi estas..

# La Trezoro

Vortaro de arabaj kaj islamaj proverboj\*

Ĉi tiu verko prezentas pli ol 6.000 proverbojn, maksimumojn kaj anekdotojn el diversaj epokoj de la vasta araba kaj islama mondo, kaj priskribas saĝecon, humoron kaj esprim-manierojn de ties popoloj. Ili komenciĝas per beduena sperto :

*Ne malplenigu vian akvosakon je ekvido de miraĝo.*

kaj fariĝas pli prudentaj, konsilante :

*Lasu flanken kion vi aŭdas, ne kredu ĉion kion vi vidas.*

aŭ, se okazas ke vi loĝas en urbo :

*Kontraŭu al ministro, tamen neniam al lia pordisto.*

Kaj : *Se reganto estas tirano,  
la juĝisto estas lia pendumisto.*

Kaj tio eble estas tial ke : *Se hazarde vi trovas unu juĝiston en Paradizo vi trovos du en Infero.*

Nun, konsideru : *Malriĉo estas robo el fajro.*

kaj : *Malriĉulo kuranta en la strato  
devus esti sur sia vojo servi al riĉulo.*

Kontraste al araboj, kiujn eble neniu nacio superas pri emo montri sian amon, iliaj – ĉu nur iliaj ? –

*Virinoj povas kaŝi sian amon kvardek jarojn,  
tamen neniam sian malamon unu horon.*

La Diablo ne tute konsentis pri tio, kiam li deklaris *Mi estas la instruisto de viroj kaj lernanto de virinoj.*

Fore de la Diablo, tamen, eble oni ŝatos ekscii :

*Toleremo estas ankaŭ malavaro.*

*Gajeco estas ora manpremo.*

*Se vi ne povas esti stelo en ĉielo estu kandelo surtere.*

*Ne ĵetu sagojn de malbeno al via malamiko,  
ĉar eble vi trafus vian amikon.*

*Kiso sen amo bruligas la lipharojn.*

*Unu libera homo povas liberigi tutan urbon.*

kaj milajn aliajn el spiritaj, belaj spertoj de la popolo. Mi do scivolemas ĉu oni emos ke ni promenadu kune ene de tia flora ĝardeno - arda, bunta kaj ridema - pro iom da varieco.

\* La verko konsistas el 423 rubrikaj alfabetnombro klasigitaj laŭ temoj (ekzemple : 1. *Abundo*, 275. *Mono*, 423. *Vualo*), komputil-kompostitaj en ĉ. 170 A4-paĝoj. **Prezo** : 30 £ por sendo al Eŭropo : aldonu 8 £ por aera sendo ekster Eŭropon. Bv sendi vian mendon kun pago al **la aŭtoro** : **Hussain M. Al-Amily**, (*La Domo de Lumo*), 134 Brent Road, Southall, (Gr. London), UB2 5LD, Britujo. Tel/faks. : 0181-893.5960. ( P.S. La verko estas havebla ankaŭ en araba versio je similaj enhavo kaj priskribo.)

## Leteroj de legantoj

Sharm el Sheikh, Apr. 30<sup>a</sup> 1995

Kara Samideano,

Mi tre dankas vin por la sendo de n<sup>o</sup>16 kaj, eĉ pli, por via peto sendi pliajn informojn pri la koptoj. Mi ne estas kopto sed ano de la katolika eklezio, "daŭra" diakono\* en ĝi. (Se vi memoras mi partoprenis la *Ekumenan Kongreson* en Annan Court.)

Pri M-ro Jakobo **Gaillot** : mi sendis leteron al la nuncio en Bruselo (kun kopio al la ĉefepiskopo). Ambaŭ respondis, kaj M-ro Danneels tre simpatie :

« (...) *La eklezio estas divina sed ankaŭ homa kun homaj mankoj.* »

Amikajn salutojn, samideane via

*Raymond Lecat*

\* Pro la fakto ke la papo J.P. II-a, per persona decido ne konsentis ke mi reedziĝu (mi estas vidvo de 1985) malgraŭ speciala peto al Romo de mia episkopo, mi ne plu aktivas kiel diakono ĝis li (JP II) aŭ sekvanta papo decidus la malon. Laŭ li mi devus plufraŭlumi ĝismorte aŭ peti relaikiĝo antaŭ reedziĝo. Mia decido : « *Mi nun estas diakono, kaj diakono mi restos.* » Mi do ne reedziĝis kaj nun vivas kun mia kunulino en Egiptio proksime de mia filino, edzino de Egipto islama. Kompreneble mi agos denove reen en Belgio kiel diakono, tuj kiam la malpermeso ĉesos.

Sharm el Sheikh, Junio 23, 1995

(...) En Sharm el Sheikh mi konas nur kelkajn Egiptojn kiuj estas ĉu koptoj ĉu katolikoj. Sed pro lingvaj malfacilaĵoj mi ne facile kapablas interparoli kun ili (des pli ke **ili, en islama lando, ne ŝatas paroli pri religioj**). (...) Samideane via

Strasburgo, la 15an de oktobro 1995

Kara Christian !

(...) Kun mia kaj aliaj financaj helpoj, Mohamedo sukcesis flugi al Tampere por la UK, kaj profitis la okazon por peti azilon de Finnlando\*. Nun li estas en hejmo por azilpetantoj en Tampere, kaj ricevas etan monhelpon de la finnlanda registaro\*\*. La advokato kiu zorgas pri lia dosiero avertis lin ke la proceduro riskas esti longa, sed se la finnoj lin akceptos, ili donos al li vizojn por lia edzino kaj liaj gefiloj (...) Mi pagos abonon por li.

Amike, *Jacqueline [Lépeix]*

\* Vd. "*La danĝera lingvo ...la danĝera revuo !*" en *Asistilo* n-ro 15 p.23

\*\* Oni certe povas **subtenegi lin morale** sendante leteron (kun eble ankaŭ financa helpeto?) al : Bettahar M'hamed, Pohjolankatu 25A, SF-33500 Tampere.

# La Serio pri Gilgameŝ

de Sînleqe'unnennî \*

[Aŭskultinte]  
la konsilon patran,  
la ĉasisto  
iris [al Gilgameŝ].  
Li ekmarŝis,  
kaj alvenis  
en Urukon.  
" [Aŭskultu,] Gilgameŝ,  
elaŭdu\*\* :  
estas] viro  
[kiu venas de l'dezerto],  
la [plej] forta de la lando  
la poten[ca].  
[Lia muskolaro] estas fortikega :  
bloko el ĉielo !  
[Konstante] li vagas  
meze de l'dezerto ;  
Konstante [paŝtiĝas]  
li kun sia herdo ;  
Konstante frekventas  
li la akvobordojn.  
Mi timegis :  
de li ne alproksimiĝis !  
Li plenigis miajn enfalulojn  
kiujn mi [mem] fos[is] ;  
li disŝiris ĉiujn retojn  
[kiujn mi etendis],  
kaj deturnis de mi  
bestojn kaj bestetojn !  
Li min ne plu lasas  
ĉasesplori en la stepo ! "  
Gilgameŝo  
alparolis al li, la ĉasisto :  
" Iru, ho ĉasisto, kaj kun ci konduku  
la hetajron Laĝojiga.  
Kiam lia herdo  
al la akv' alvenos  
ŝi demetu la vestaĵojn,  
[ŝi mal]kaŝu siajn ĉarmojn ;  
kiam li ŝin vidos  
li [proksimiĝinte,] kun ŝi ekrilatos.  
Lia herdo, kunvivinte kun li,  
al li iĝos fremda ! "  
  
La ĉasist' foriris, kondukante kun si  
la hetajron Laĝojiga.  
Ili ekvojaĝis  
kaj vojiris ;  
post tri tagoj,  
al la taŭga lok' alvenis.

La ĉasist' kaj la hetajro,  
sidiĝintaj en angulo,  
tie restis unu tagon, duan tagon,  
ĉe la bordo de l'akvejo.  
Jen la herd' alvenis  
por ĝissate trinki,  
jen alvenis la sovaĝaj bestoj  
por regali sin per akvo.  
Enkidu' mem,  
dezertano,  
paŝtiĝadis  
kune kun gazeloj ;  
kune kun la herdo,  
li ĝissate trinkis ĉe l'akvejo,  
kaj regalis sin per akvo  
kune kun la bestoj.  
Laĝojiga lin ekvidis,  
hom-pratipon,  
tremtimindan viron  
de la plena stepo :  
" Jen li ! [la ĉasisto diris]  
Malretenu cian robon, Laĝojiga,  
malkaŝante cian sekson  
por ke li volupton de ci prenu !  
Kaj ne timu  
preni lian spiron !  
Kiam li cin vidos,  
li al ci alvenos :  
lasu fali cian veston  
por ke li kuŝiĝu sur cin,  
tiam faru al li, al la hom-pratipo,  
cian in-aferon !  
Lia herdo, kun li kunvivinte,  
al li iĝos fremda,  
kiam per amumoj siaj  
li cin kajolados ! "  
Laĝojiga ekdisigis la vualojn siajn  
kaj malkovris sian sekson,  
[ke] li la volupton sian tie prenu,  
sen timeti  
preni lian spiron.  
Kiam ŝi faligis sian veston,  
li kuŝiĝis sur ŝin,  
kaj ŝi faris al li, al la hom-pratipo,  
sian in-aferon,  
dum li per amumoj siaj  
ŝin kajolis.  
Sestage sepnokte Enkidu  
ekscite seksumis,  
kun sperta hetajro !

Satiĝinte je volupto el ŝi,  
estis li tuj reironta kun la herdo.  
Sed ĉe l'vido de Enkidu, fuĝis la gazeloj,  
kaj foriris la sovaĝaj bestoj.  
Kun la korpo [energi-]malplenigita  
volis li ekkuri :  
pro nefidindeco nova de l'genuoj  
li ne povis siajn bestojn persekuti,  
estis Enkidu' senfortigita,  
nekapabla kuri kiel en la antaŭeco.

Estis li maturiĝinta,  
iĝanta inteligenta :  
li revenis [si]di  
ĉe l'piedoj de l'hetajro,  
li okule fiksis  
la vizaĝon ŝian  
kaj komprenis  
kion estis ŝi diranta !

Laĝojiga  
alparolis al Enkidu :  
" [Be]la estas ci, Enkidu !  
Ci similas iun dion !  
Kial ci galopu meze de la stepo  
kun la bestoj ?  
Min bonvolu lasi cin konduki  
al Uruk la gregej-ĉirkaŭita,  
al la sankta Domo,  
restadej' de Anu kaj de Iŝtar,  
kie [vivas] Gilgameŝo  
kun matura fortikeco ;  
al bubal' simila,  
superanta la (plej) virajn ! "  
Ŝi lin instigadis,  
li al ŝiaj diroj jesis :  
per intuicio  
antaŭsentis li amikon.  
Alparolis  
Enkidu' al la hetajro :  
" Ek ! ho Laĝojiga,  
min konduku,  
al la sankt-sakrala Domo  
restadej' de Anu kaj de Iŝtar,  
kie [vivas] Gilgameŝo  
kun matura fortikeco ;  
al bubal' simila,  
superanta la (plej) virajn !  
Mi mezuros forton mian kun la lia,  
kaj sev[era] estos nia lukto !  
[Kaj proklam]os mi en Uruk :  
"Estas mi la (plej) potenca !"  
[Tien eni]rinte,  
ŝanĝos mi de ĉio la destinon !  
La enstepo-naskiĝinto  
[estos la (plej) forta, la] fortika ! "

- " [Venu, ni fo]riru !  
[Ni ali]ru ĝis li  
[kaj mi montros al ci Gilgameŝon,  
ĉar] mi scias kie li troviĝas.  
V[enu, ho] Enkidu,  
al [Uruk-]la-gregej-ĉirkaŭita,  
ki[e vi]roj  
ĉetalie portas ŝtofajn zonojn,  
kie ĉi[utage] oni festas,  
kie ĉ[iam so]nas tamburinoj,  
kie ĝoj[aj la hetajroj],  
kun belec' neriproĉebla,  
estas las[civeg]aj,  
[kun volupto-]krioj,  
[tiom logaj ke] la altranguloj  
nok[te el]litiĝas !  
Ho Enkidu,  
[kiu] vivi [ankoraŭ ne sc]iis,  
mi konigos al ci Gilgameŝon,  
[tiun] ĉiam bonhumoran homon !  
Ci, lin rigardante,  
vidos, vidalvide,  
[kiel] en la plej' de sia forto  
estas li belkorpa, imponega ;  
li radias ĉarmon  
per la tuta personeco,  
kaj superas [eĉ] cin  
per la energio :  
estas li nelacigebla,  
tage nokte !  
Flankenmetu cian agresemon,  
ho Enkidu :  
por Gilgameŝ  
Ŝamaŝ havas korinklinon  
kaj de Anu, Enlil, Ea  
estis dilatita lia inteligenteco.

Antaŭ ol ci, el dezerto cia,  
estas ĝis li alveninta,  
pri ci songis  
li en Uruk,  
kaj ĵus post la ellitiĝo,  
tuj alparolante la patrinon sian,  
li rakontis al ŝi siajn songojn.  
"Panjo mia, songon  
havis mi ĉi-nokte :  
Min ĉirkaŭis  
la ĉielaj steloj ;  
ia bloko el ĉielo  
peze falis tutproksime de mi.  
Volis mi ĝin levi :  
[estis ĝi tro] peza por mi !  
Provis mi ĝin delokigi :  
sed ne povis mi ĝin movi !  
Antaŭ [tiu] staris  
La Uruka loĝantaro ;

[la popolo]  
 ĉ[irkaŭ ĝi grupiĝis ;  
 svar]mo [alpuŝiĝis] a[l li ;  
 viroj ama]siĝis por li[n vidi :  
 kaj kiel al be]bo,  
 ili kisis al li la piedojn ;  
 [Mi,] mi lin kaĵolis,  
 [kiel se] edzinon.  
 [Poste mi] lin metis  
 ĉe piedojn [ciajn],  
 [kaj ci,  
 ci] lin [trak]tis egalece kun mi ! "

[Saĝa kaj s]pertula,  
 [la patrino de Gilgameŝ, ĉ]ioscia,  
 alparolis sian suverenon,  
 saĝa kaj fakula,  
 [la diino Bubalin-Ninsuna], ĉioscia,  
 alparolis Gilgameŝon :  
 " La ĉielaj steloj  
 [estas la eskorto] cia !  
 [Tia bloko el ĉi]elo,  
 kiu peze falis tutproksime  
 – [volis ci ĝin levi,  
 estis ĝi] tro peza por ci ;  
 [provis ci ĝin delokigi  
 sed] ne povis ci ĝin movi – ,  
 kiun [ci finfine me]tis  
 ĉe piedojn miajn,  
 kiun [mi mem  
 trak]tis egalece kun ci,  
 kaj ci lin kaĵ[olis  
 kiel se edzinon :  
*alvenos potenca] kompano,  
 helpema [al sia amiko,  
 la plej forta en la lando,  
 kaj la plej] fortika,  
 [tiel] fir[ma  
 kiel bloko el ĉielo] !  
 [Ĉar ci lin] kaĵolis  
 [kiel se edzinon :  
 ĉi tio signifas  
 ke] cin [li for]lasos [neniam] !  
 Cia song' [bonega estas,  
 plej fa]vore aŭspicia ! "*

[Por la dua foj' Gilgameŝ  
 alparolis] la patrinon sian :  
 " [Mi] alian songon ha[vis,  
 panjo mia].

[En Uruk la gregej-ĉirkaŭita]  
 estis hakilet' metita.  
 Ĉirkaŭ ĝi amas' ariĝis.  
 [La Uruka loĝan]taro  
 staris antaŭ tiu ;  
 [la popolo]  
 ĉirkaŭ ĝi grup[iĝis ;  
 svar]mo  
 alpuŝiĝis al ĝi.  
 [Kaj mi],  
 mi ĝin metis ĉe piedojn ciajn.  
 [Kaj mi amis ĝin] kaj ĝin kaĵolis  
 kiel se edzinon  
 [dum] ci,  
 ci ĝin traktis egalece kun mi ! "

[Sa]ĝa kaj spertula,  
 [la patrino de Gilgameŝ], ĉioscia,  
 alparolis sian filon,  
 [sa]ĝa kaj spertula,  
 [la diino Bubalin-Ninsuna], ĉioscia,  
 alparolis Gilgameŝon :  
 " [Tiu hakile]to kiun vidis  
 ci, ho viro,  
 [kiun amis ci] kaj ci kaĵolis  
 [ki]el se edzinon,  
 kiun mi [mem] traktis  
 egalece kun ci :  
*alvenos potenca kompano  
 helpema al [sia] amiko,  
 [la plej fo]rta [de la lando  
 kaj la plej] fortika,  
 [tiel] firma  
 [kiel bloko el ĉi]elo ! "*  
 [Kaj Gilgameŝ sian buŝon malferminte],  
 alparolis la patrinon sian :  
 " [Ja] okazu al mi  
 [tiel] bona ŝanco !  
 [Tian konfidencan homon kaj amikon]  
 mi ricevu,  
 [ja ricevu] mi mem  
 (tian) konfi[dencan homon kaj amikon]."  
 [Jen] la songoj  
 [priskribitaj de Gilgameŝ]. "  
 Kaj la songojn de Gilgameŝ  
 [Laĝojiga] rakontadis al Enkidu  
 [dum ĉe l'bordo] de l'akvejo  
 ambaŭ [plu daŭrigis siajn k]aresadojn.

[Fino de la unua tabuleto].

\* Daŭrigo de n-ro 17 p.9-11 : fino de la 1-a Tabulo. La traduko baziĝas ĉefe sur la franca trad. de Jean Botéro.

\*\* La kursivoj signas amfibrakojn por foje rompi la monotonan trokean ritmon. (Ĉi tio senrilate kun la originalo).

Eposoj el antikva Ugarito : *Baal kaj Anat, Krt, Aqht* trad. el la ugarita de D. Broadribb. Temas pri korektita kaj reviziita 46-paĝa teksto aperinta en 1971 en *Biblia Revuo*, de tabuletoj skribitaj ĉ. 1500 a.K., do ĉ. 300 jarojn pli aĝaj ol la nineva versio de *Gilgameŝ*. Petu de : Bookleaf Publ., 59B Lukin St. Beverly WA 6304, Aŭstralio. (Prezo ne indikita).

# Kaj nun *du* Panĉhen-Lamaoj ???

( Sekvo de la tibeta "nigra romano" )



Mi finis la lastan artikolon pri la *Malliberigita dua ĉefo de la vaĝrajana budhismo* per jena "profeta" atentigo : "*La ĉinaj aŭtoritatoj asertas (...) ke la serĉado de la reenkariginto ankoraŭ ne finiĝis*"...

Certe, ĉar ili ne kontentigis sin per la tuta malaperigo de la 6-jara Ĉhökji Njima (rekonita de la Dalai-Lamao) kaj lia familio, pri kiuj neniu sukcesis ricevi novaĵojn de pli ol ok monatoj, krom lakona deklaro, la 13-an de januaro, de la proparolanto de la ĉina ministrejo de la aferoj eksterlandaj : "*La knabo estas bonfartanta, tion ĉi mi asertas*"<sup>2</sup>, tiel ĉi pruvante ke li sendube estas sub la (nepetita) "prizorgado" de la ĉina registaro.

Ankaŭ kvindekda monaĥoj de lia ĉefmonaĥejo Taŝilumpo en Ŝigatse estis malliberigitaj en julio, el kiuj restis "*pli ol 30*" ankoraŭ en decembro. (Laŭ atestanto<sup>3</sup>, estis pli ol 140 politikaj mal-liberuloj en la prizono Njari en Ŝigatse).

## Senĉefigita Komisiono

Komence de novembro okazis en Pekino kunveno de la 24-homa oficiala Komisiono<sup>4</sup> kies iama ĉefo, Ĉadrel Rinpoĉhe, ankaŭ estas "mankanta" (t.e. preskaŭ certe malliberigita) de pli ol ok monatoj. La 11-an de novembro ĝi publikigis liston de nur tri oficialaj kandidatoj, en kiu ne plu enviciĝis la nomo de la reenkariginto rekonita de la Dalai-Lamao en majo, kvankam antaŭe li estis unu el la kandidatoj prezentitaj de tiu sama Komisiono. Raportante pri la kunveno en unua paĝo, *China Daily* [Ĉina Ĵurnalo] titolis sian tutpaĝan artikolon : "*Tibeta animserĉado alproksimiĝas de la fino : la [Ĉinia] Prezidanto [Ĝjang Zemin] alvokas al rapida konfirmado.*"<sup>5</sup>

## Tenebra elekto

Kaj senanonce, la 29-an de novembro<sup>6</sup> en Lhasao, antaŭ la tagiĝo dum la resto de la urbo estis ĵetita en tutan obskuron pro ĝenerala elektra paneo, okazis la oficiala divenado per ia loterio. Kaj Jasper Becker, el Pekino, aldonas en *South China Morning Post* [Sud-Ĉinia Matena Poŝto] : "*Estas famigite ke la knabo estis elektita antaŭe (...) kaj lia loteriaĵo estis markita tiel ke ĝi povu esti rekonata de la Bhumi Rinpoĉhe antaŭ ol li elprenu ĝin.*"<sup>7</sup> Ĉu necesas precizigi ke la patro de ĉi-knabo estas fidinda membro de la *Komunista Partio*<sup>8</sup> ?

Kun "*surpriza rapideco*"<sup>9</sup> ĉar kutime tio okazas post ĉ. unu jaro<sup>9</sup>, la ĵus "ĉine elektita" Panĉhen-Lamao estis oficiale surtronigata la 9-an de decembro en la monaĥejo Taŝilumpo ; kaj, malgraŭ la tradicio kaj la antaŭaj oficialaj asertadoj pri lia

"*edukado ĉe Taŝilumpo*", li estis sekrete sendata al Pekino komence de januaro, per speciala flugo kune kun sia familio kaj sia edukonto, la Bhumi Rinpoĉhe ; kaj ili estis veturigataj al izolita villo (iam uzita por la malfavorita Parti-Sekretario Ĉen Ŝitong), apud Huairu, la urbo kie okazis la *UNA Forumo de la Ne-Registaraj Organizoj* en septembro, unuhore aŭte de la ĉefurbo. Taĉmento de la *Popola Armita Polico* zorge gardas la lokon ĉirkaŭitan de muro, meze de arbaraj montetoj.

## Ambaŭ en danĝero ?

La oficiala preteksto de la ĉinaj aŭtoritatoj estis ke "*la juna knabo povus esti mortigata de la Tibetanoj kiuj kredas ke la vera Panĉhen Lamao estas tiu rekonita de la Dalai-Lamao.*"<sup>9</sup>

Kaj fakte la 18-an de januaro je la 22-a, bombo eksplodis ĉe la domo de Sengĉhen Lobsang Gjalten en Lhasao, grave vundante unu homon kaj damaĝante la konstruaĵon. Tiu ĉi estis la unua lamao kiu kritikis la Dalai-Lamaon kaj subtenis la ĉinajn aŭtoritatojn en la konflikto pri la reenkariginto, kaj estis nomumita en julio kiel abato de Taŝilumpo por anstataŭi Ĉadrel Rinpoĉhe, la abaton elektitan de la antaŭa Panĉhen-Lamao. Sed li eskapis la murdprovon ĉar li tiam estis en Pekino.<sup>10</sup> La oficialuloj en Lhasao "*havis nenian scion pri ia eksplodo*" kaj proparolanto de la *Buro de la religiaj aferoj*, en Pekino, neas ke tia evento okazis.<sup>11</sup>

## La "amiko" de la Panĉhen-Lamaoj

La 12-an de januaro la 6-jara knabo estis invitita de la ĉinia prezidento kiu diris : "*La ĉina registaro respektas kaj protektas la liberecon de religio (...) La Komunista Partio kaj la registaro esperas ke la XI-a Panĉhen-Lamao bone studos, sane kreskos kaj heredos la patriotan spiriton de la antaŭa Panĉhen-Lamao*", admonante lin "*subteni la gvidantecon de la Partio*" kaj "*defendi la unuecon de la patrio*", kaj "*ami la socialismon*".<sup>12</sup> Kaj li aldonis : "*Mi bone konis la X-an Panĉhen-Lamaon kaj mi estis lia amiko*".

La knabo respondis : "*Dankon al la Partio kaj al Prezidento Ĝjang, mi studos diligente kaj estos patriota vivanta budho kiu amas la religion*".<sup>13</sup>

(La patro de la infano estis poste akceptata de la ĉinaj regantoj. En decembro estis donacita luksa aŭto "*al la reenkariginto*".) (Notoj sur sekva p.)



## Urĝa agado de *Amnestio Internacia*

AI petas ke estu sendataj telegramoj, teleksoj, ekspresaj kaj aerpoŝtaj leteroj en la angla, la ĉina aŭ en via propra lingvo\*, postulantaj ke la ĉinaj aŭtoritatoj rivelu la restadlokon de Gedun Ĉhökji Njima kaj lia familio kaj petantaj ke ĉiaj liberlimigoj estu tuj nuligitaj kaj ke ili estu liberaj reiri al sia vilaĝo kaj vivi sen liberlimigoj nek turmentadoj ; postulantaj la tujan kaj senkondiĉan liberigon de **Ĉhadrel Rinpoĉhe, Gjatrül Rinpoĉhe, Ĉampa Ĉhung**-la [la kuraĝa asistanto de Ĉhadrel] kaj pli ol 50 gemonahoj kaj gelaikoj malliberigitaj okaze de la disputo pri la XI-a Panĉhen-Lamao.

Sed estas petite, post februaro, unue kontroli la validecon de la agado ĉe la *East-Asia Sub-Regional Team* (p/a A.I., 1 Easton Str., London, WC1X 8DJ, Britujo).

\* Sed eble **ne en esperanto** : bonvolu unue atenti pri eventualaj konsekvencoj por niaj ĉinaj gesamideanoj !

### Notoj

- 1/ Laŭ septembra n-ro de *La Lettre du Tibet*, el *Mondaj Tibet-Retaj Novajoj* : MTRN (*World Tibet Network News*).
- 2/ Chen Jian, laŭ Paul Eckert en sia artikolo *Amnestio diras ke la la pridisputata lama-infano de Tibeto estas "mankanta"*, publikigita de MTRN, 19-1-1996.
- 3/ S-ino Ĉhungla: *Tibetan woman arbitrarily arrested and detained for more than 4 months speaks out*, MTRN 9-1-96.
- 4/ Oficiale nomita : "*Gvida grupo por lokalizi la reen-karniĝ-infanon de la Panĉhen-Lamao.*"
- 5/ T-Internaci-Retaj Novajoj : *Tibeta ĵurnalo sabotita*, 28-1.
- 6/ Laŭ pli multaj fontoj ol *la 30-an* laŭ nur Jasper Becker
- 7/ *Panchen Lama flown to Beijing*, 5-1-96 (MTRN 8-1)
- 8/ *Tibet Info*, 28-1-96, laŭ *AFP* kaj MTRN.
- 9/ *Tibet Info*, 11-1-96 : *Le Panchen Lama "chinois" à Pékin*
- 10/ TIN laŭ Hongkonga *Sunday Morning Post*, 28-1.
- 11/ MTRN, laŭ PTI novaj-agentejo en Nov-Delhio, 28-1.
- 12/ Aŭ : "*Ni esperas ke la XI-a Panĉhen-Lamao respektos kaj amos la patrion kaj la socialismon kiel faris lia antaŭulo*"
- 13/ Aŭ : "*Mi dankas Prezidenton Ĝjang kaj promesas bone studi la socialismon kaj la patriotismon*".

14/ Gedun Drupa (dge-'dun-grub-pa), 1391-1475, nur postmorte kaj retroefike nomita la unua Dalai-Lamao\* kiam la III-a Gjelua Rinpoĉhe (rgjal-ba rin-po-ĉhe) ricevis tiun ĉi nomon en 1578, de la mongola ĉefo Altan-khan.

Nun pri Panĉhen, ŝajnas al mi ke historie la unua kiu ricevis ĝin estis la kaŝmira budhista saĝulo Ŝâkja Ŝrî, kiu, post la islama tuta detruo de la hindaj budhanaj monaĥejoj *Odantapuri* kaj *Vikramaŝîla* en 1203, iris fini sian vivon en Tibeto. (Laŭ S. Ĉ. Das, *Tib.-English D.*)

\* Cetere, ŝajnas ke tiu ĉi mongola titolo, kiu signifas *oceano* (subkomprenite : de saĝo), prononciĝas *ta-le*. (Laŭ Snellgrove, de la Brita Akad., en *Enc. Univ.*, 16 p.99a)

15/ Respektive skribitaj laŭ la tibeta ortografio: bkra-ŝis-lhun-po kaj gŝis-ka-rtse.

16/ Laŭ Sarat Ĉ. Das, la Panĉhen-Lamao tamen estis la reganto de (g)Tsang, unu el la kvar tibetaj provincoj. Kaj de 1565 ĝis 1642 tiu ĉi provinco estis regata de la princoj de Ŝigatse, kiuj subtenis ne la *Geluganojn* (dge-lugs-pa), la reformitan branĉon kies ĉefo estas la Dalai-Lamao, sed la *Kagju-anojn* (bka'-rgjud-pa), kies ĉefo estas la (Gjelua) Karmapa : pri la XVII-a, vidu n° 11 p.6.

## Historiaj klarigetoj

Al S-ino Fabienne Jagou, kiu preparas doktoran tezon pri la linio de la Panĉhen-Lamaoj (ĉe la Fako L.C.A.O. de la Pariza Universitato), estis petite alporti kelkajn precizigojn, kiujn ni do tradukas aldonante (apude) kelkajn notojn el aliaj fontoj.

### *De kie venas la titolo kaj institucio de la Panĉhen-Lamaoj ?*

Fakte temas pri titolo kiun la I-a Dalai-Lamao<sup>14</sup> havis, kaj kiu estis donacata de la "*Granda Kvina*" [Dalai-Lamao] al lia spirita majstro, abato de la monaĥejo Taŝilumpo en Ŝigatse<sup>15</sup>, en 1642.

La silabo *pan*, mallongigo de la sanskrita vorto *pandita*, signifas erudiciulon ; kaj *ĉhen*, grandan, en la tibeta. Dum la jarcentoj firmiĝis rilato "*Suno/Luno*" (majstro/disĉiplo) inter la du grandaj lamaoj : la pli aĝa sisteme plenumis la rolon de spirita majstro de la pli juna, kaj validigis la rekonon de ties reenkarniĝo. La civila povo tamen estis ekskluzive en la manoj de la Dalai-Lamao kaj de ties registaro<sup>16</sup>.

### *Kiaj estis la proceduroj ebligantaj malkovri tiun reenkarniĝon ?*

Ili ne multe diferencis de la reguloj observitaj por identigi la reenkarniĝon de la grandaj lamaoj.

Foje tiuj lasis indicojn interpretendajn. Oni konsultis la orakolojn, serĉis viziojn sur la lago Lhamo Tso, praktikis divenadojn (nome per sonĝoj) same kiel la identigo [al kandidatoj] de personaj objektoj [de ilia antaŭulo].

### *Kia estis la rolo ludita de la ĉina imperiestro en tiu rekonado ?*

Li ludis nenian rolon. Simple, ekde 1792, la *amban*-oj, funkciuloj reprezentantaj la manĉu(r)an imperiestron [Ĉjanlong, el la Ĉing-dinastio] ĉe la tibeta registaro ekvolis arbitracii la kverelojn kiuj povis okazi pri la reenkarniĝoj, uzante la hazardan eltiradon de eburaj bastonoj el oraj ujoj.

La tibetanoj neniam serioze atentis pri tia elpensajo. Oni cetere konstatas ke ĉiufoje la rezulto de la hazarda eltirado kongruis kun la decido jam anoncita de la religiaj respondeculoj.

Tiu proceduro estis tutsimple forlasata ĉe la fino de la manĉu(r)a imperio en 1911. La Ĉinia Popola Respubliko havas nenian rajton pravigi sin per tio. Cetere tia proceduro estis uzata nek por la (nuna) XIV-a Dalai-Lamao, nek por la X-a Panĉhen-Lamao (mortinta en 1989).



# 30-jariĝo : *Internacia Konvencio pri Civilaj kaj Politikaj Rajtoj*

Ni tradukas ĝian prireligian artikolon celebre al la 50-jariĝo de UNO, 30-jariĝo de tiu ĉi *Konvencio kaj 15-jariĝo de la Deklaracio pri eliminado de ĉiuj formoj de maltolero kaj de diskriminacio bazitaj sur religio aŭ kredo\**, kies *Artikolo 1* estas laŭvorte identa kun la tri unuaj paragrafoj de ĉi tiu **Artikolo 18** :

(1) Ĉiu havos la rajton je libereco de penso, konscienco kaj religio. Tiu ĉi rajto inkluzivos la liberecon havi aŭ adopti religion aŭ kredon laŭ sia elekto, kaj la liberecon, aŭ individue aŭ en komuneco kun aliaj kaj publike aŭ private, manifesti sian religion aŭ kredon en kulto, observado, praktikado kaj instruado.

(2) Neniu estos elmetata al premado kiu difektus lian liberecon havi religion aŭ kredon laŭ sia elekto.

(3) La libereco manifesti sian religion aŭ kredojn povas esti elmetata nur al tiaj limigoj kiaj estas preskribitaj per leĝo kaj necesaj por protekti la publikajn sekurecon, ordon, sanon aŭ moralon aŭ la fundamentajn rajtojn kaj liberecojn de aliaj.

(4) La Ŝtatoj partioj ĉe tiu ĉi Konvencio sin devontigas domaĝi la liberecon de gepatroj kaj, kiam aplikende, de kuratoroj, zorgi pri la religia kaj morala edukado de siaj infanoj konforme al siaj propraj konvinkoj.

## **Ĝenerala komentario de la Homrajta Komitato**

1. La rajto je libereco de penso, konscienco kaj religio (kiu inkluzivas la liberecon havi kredojn) en la artikolo 18 (1) estas gravega kaj profunda ; ĝi entenas la liberecon de penso pri ĉiuj temoj, de persona konvinkiteco kaj de aliĝo al religio aŭ kredo, manifestataj aŭ individue aŭ en komuneco kun aliaj. La Komitato atentigas la Ŝtatojn partiojn pri la fakto ke la libereco de penso kaj la libereco de konscienco estas protektataj egale kun la libereco de religio kaj kredo. La fundamenta karaktero de tiuj ĉi liberecoj estas ankaŭ reflektita en la fakto ke tiu ĉi klaŭzo ne povas esti esceptiĝebla, eĉ en tempo de publika krizego, kiel deklarite en la artikolo 4 (2) de la Konvencio.

2. La artikolo 18 protektas teismajn, neteismajn kaj ateismajn kredojn, same kiel la rajton konfesi neniun religion aŭ kredon. La terminoj kredo kaj religio estas vastsence interpretendaj. La artikolo 18 ne limiĝas en ĝia aplikado je tradiciaj religioj aŭ je religioj kaj kredoj kun instituciaj karakteroj aŭ praktikoj analogaj al tradiciaj religioj. La Komitato do vidas kun zorgo kian ajn tendencon diskriminacii kontraŭ kiu ajn religio aŭ kredo pro kiaj ajn kaŭzoj, inkluzive de la fakto ke ili estas nove establataj aŭ reprezentas religiajn minoritatojn kiuj povas esti elmetataj al malamikeco de superreganta religia komunumo.

3. La artikolo 18 distingas la liberecon de penso, konscienco, religio aŭ kredo disde la libereco manifesti religion aŭ kredon. Ĝi ne permesas kiajn ajn limigojn en la libereco de penso kaj konscienco aŭ en la libereco havi aŭ adopti religion aŭ kredon laŭ sia elekto. Tiuj ĉi liberecoj estas senkondiĉe protektataj, kiel estas protektata ĉies *rajto havi opiniojn sen enmiksiĝo* en la artikolo 19 (1). Akorde kun la artikoloj 18 (2) kaj 17, neniu povas esti devigata riveli siajn pensojn aŭ aliĝon al religio aŭ kredo.

4. La libereco manifesti religion aŭ kredon, povas esti uzata « *aŭ individue aŭ en komuneco kun aliaj kaj publike aŭ private* ». La libereco manifesti religion aŭ

kredon en kulto, observado, praktikado kaj instruado entenas vastan kampon de agoj. La koncepto de kulto etendiĝas de ritaj kaj ceremoniaj agoj donantaj rektan esprimon de kredo, ĝis variaj praktikoj konsistigaj de tiaj agoj, inkluzive de la konstruado de kultejoj, la uzo de ritaj formuloj kaj objektoj, la elmontrado de simboloj, kaj la observado de festotagoj kaj tagoj de ripozo. La observado kaj praktikado de religio aŭ kredo povas inkluzivi ne nur ceremoniajn agojn sed ankaŭ kutimojn kiel la observadon de nutraj reguloj, la surmeton de distingaj vestaĵoj aŭ kapvestoj, la partoprenon en ritoj kunligitaj kun iuj stadioj de la vivo kaj la uzon de aparta lingvo kutime parolata de grupo. Aldone, la praktikado kaj instruado de religio aŭ kredo inkluzivas agojn konsistigajn de la direktado, fare de religiaj grupoj, de iliaj bazaj aferoj, tiel kiel, inter aliaj, la liberecon elekti siajn religiajn gvidantojn, pastrojn kaj instruantojn, la liberecon establi seminarion aŭ religiajn lernejojn, kaj la liberecon pretigi kaj disdoni religiajn tekstojn aŭ publikigaĵojn.

5. La Komitato rimarkigas ke la libereco « *havi aŭ adopti* » religion aŭ kredon necese implicas la rajton elekti religion aŭ kredon, inkluzivantan, inter aliaj, la rajton anstataŭigi sian kutiman religion aŭ kredon per alia, aŭ adopti ateisman vidpunkton, same kiel la rajton konservi sian religion aŭ kredon. La artikolo 18 (2) malpermesas premadon kiu difektus la rajton havi aŭ adopti religion aŭ kredon, inkluzive de la uzo aŭ minaco de fizika forto aŭ puna sankcio por altrudi al kredantoj aŭ nekredantoj resti fidelaj al siaj religiaj kredoj kaj societoj, apostazi aŭ konvertiĝi. Politikoj aŭ praktikoj havantaj la saman celon aŭ efikon, tiel kiel, ekzemple, tiuj kiuj restriktas la alireblecon al edukiteco, kuracado, dungiteco aŭ la rajtojn garantiitajn per la artikolo 25 kaj aliaj klaŭzoj de la Konvencio, estas same neakordiĝeblaj kun la artikolo 18 (2). La saman protekton ĝuas la anoj de ĉiuj kredoj kies naturo estas nereligia.

(Sekvote)

Ĝenerala komentario n-ro 22 (48), adoptita dum la 48-a sesio (20-7-1993).

\* Jam tradukita en n-ro 17 p.4-5.



# "Religia UNo" nepre necesas !



## Al starigo de mondskala interreligia kunlabor-strukturo

DEGUĈI Icuki\*

Se religiuloj (...) ne celas plifortigi reciprokan interamikecon por la kunvivado de religioj, mi opinias ke la mondo neniam resaniĝos. Kun tia signifo, la rolo de religiuloj en nuna tempo devas esti granda.

Tial, mi ĉi tie volas prezenti mian konkretan proponon. Estas evidente ke la forto kion ni respektive posedas ne povos esti plene elmontrita se respektivaj religioj kaj sektoj individue faras siajn agadojn laŭ siaj bontrovoj. Ekzemple, se oni disigas brulantajn karbojn, iliaj varmpovoj malfortiĝas. Tamen, post kiam oni kolektas ilin, ili ekflagras, kaj eligas el si grandan varmpovon. Samkiel tio ĉi, ni nepre bezonas konkretan kunlaboran sistemon de religioj por ke religiuloj ludu grandan mondkalan rolon.

### Tri paŝoj al kunlaboro

Mi opinias ke ni devas nepre ordigi tri jenajn paŝojn por atingi grandan kunlaboron de respektivaj tutmondaj religioj, kaj ankaŭ por ke religioj plenumu siajn hodiaŭajn misiojn.

Unue ni starigu komunan koncepton por religiaj kunlaboroj. Due, ni starigu organizon por antaŭenpuŝi ĝin. Trie, ni fiksu komunajn praktikpunktojn por religiaj kunlaboroj. Tamen, eĉ se la superuloj de respektivaj religiaj organizoj kolektiĝos, tio ne signifas facilan aferon, pro kio ni antaŭ ĉio instalu tiel nomatan "*Ĉambron de Interreligia Antaŭenpuŝo*", aŭ komisiu iun ŝarĝotan esti la fenestro de interreligiaj kunlaboroj en la diversaj religiaj organizoj kaj iliaj sektoj.

Post tio, oni regule havu kunvenon, por ke ĝi ĝenerale funkciu, kaj havu laŭeble plej vastan konsenton de multaj religiaj organizoj. En la kunvenoj oni ĝisfunde pristudu, kunordigu kaj resumu.

Kompreneble, troviĝas nemalmultaj religiaj organizoj kiuj jam havas proprajn fakojn por interreligia kunlaboro, ekzemple ĉe Hiei-zan en Tendai-skolo de budhismo, kaj Vatikano. Aliflanke, ekzistas WCRP kaj TOU\*\* kiel tegmentaj organizoj.

Mi volas ĉi tie paroli pri tio kio estas finfina neceso por agado en skalo pli granda (...) Tio estas, necesas starigi ian religian UNon. Kompreneble, povas esti ke necesos longa tempodaŭro por elfari tian tutmondan organizon, pro kio ni devas progresigi ĝin etapon post etapo.

(...) Mi proponas ke antaŭ ĉio ni starigu (...) preparan organon kiu konsistu el ŝarĝitoj por interreligia kunlaboro (...) Tie oni pristudu, utiligante la proponojn montritajn (...) por ekfari la projekton laŭ la jam menciitaj tri paŝoj.

Mi deziregas, post kiam tiu organo elfaros definitivan proponon, ke oni ĝin alprenu, ekzemple en Tutmonda Religia Pintkunveno, kaj alvoku kaj etendu ĝin al la mondo kun konkreta praktiko.

Temante pri ĝia administrado, mi pensas ke necesos tia rimedo, ke respektivaj organizoj prenu sur sin laŭvice la prezidantecon unu post alia, por eviti tro fortan influon de iu religia organizo.

Tamen, krom tia detala afero, mia sincera kaj forta penso estas ke la mondo saviĝos nur se religiuloj (aŭ religia kampo) ekfaros revolucion senprecedencan en la homa historio, kontraŭ la nuntempa tergloba krizo. Kiam tutmondaj religiuloj kune preĝos, kaj samtempe kune agos, mi opinias ke la mondo nepre pliboniĝos.

\* Dir. de Doktrina Esplora Instituto de Oomoto. Prelego ĉe *Tutmonda Religiula Forumo*, 4-11-1993

\*\* *The Temple of Understanding* (Novjorko).

### Fakso de la ASISTI-prezidanto

Mi aŭdis ke s-ro Kiotaro DEGUĈI jam prezentis la konkretan proponon pri tiu ebleco krei "*Internacian Organizadon de Unuiĝintaj Religioj*" en Novjorko okaze de la komuna Diservo honore al la 50-a datreveno de UNo, lastan oktobron, kaj ricevis grandegan reagon. (29-2-1996)

### Rimarko de la ASISTI-sekretario

Ĉar 1996 ankoraŭ iel estas, ŝajnas al mi, la "*Jaro de UNo*", tia propono "*al (Organizo de) Unuiĝintaj Religioj ?*" estas tute aktuala.

Ĝi kongruas kun la alvoko de la *Sarva-dharma-sammelana* en Bangaloro (1993)\* al tuja formado de konstanta interkreda organizaĵo aliĝanta al UNo kiel neregistara organizaĵo. (Por memoro, vidu la finan deklaron de "*Programo I*", en kies laboroj la ASISTI-sekretario partoprenis, en n-ro 15 p. 4, sub la titolo "*Celoj por interkreda kunlaborado*").

(El letero al la ASISTI-prezidanto, 17-2-1996)

\* Do kaj de IARF, kies membro ASISTI estas, kaj de WCRP, al kiu ASISTI estas nun aliĝanta.

# La Serĉado de l'Sankta Gralo :

## La mirinda kapelo

[57,17] Et Lancelot chevaucha (...) tout le travers de la forest en tel maniere qu'il ne tient ne voie ne sentier, ainz s'en vet si come aventure le meine. Et ce li fet mout mal que il ne voit ne loign ne pres ou il puisse prendre sa voie : car mout ert la nuiz obscure. Et neporec tant a alé que il vint a une croiz de pierre qui ert au departement de deus voies en une gaste lande. Et il resgarde la croiz quant il fu pres et voit par dejoste un perron de marbre ou il avoit letres escrites, ce li ert avis. Mes li tens ert si obscurs que il ne pooit conoistre que eles voloient dire. Et il resgarde vers la croiz et voit une chapele mout ancienne, et il s'i adrece car il i cuide trover gent. Et quant il est auques pres, si descent et atache son cheval a un chesne et oste son escu de son col et le pent a l'arbre.

Puis vient a la chapele et la troeve gaste et decheue, et entre dedenz, et troeve a l'entree unes prones de fer qui estoient serrees et jointes en tel maniere que len n'i poïst mie legierement entrer. Et il resgarde par mi les prones et voit la dedenz un autel qui ert mout richement aornez de dras de soie et d'autres choses, et devant avoit un grant chandelabre d'argent qui sustenoit sis cierges ardanz qui gitoient grant carté. Et quant il voit ce, si a talent d'entrer enz por svoir qui i repere : car il ne cuidoit mie qu'en si estrange leu eust si beles choses come il voit ci.

Et il vet regardant les prones. Et quant il voit qu'il n'i porra entrer, si est tant dolenz qu'il se part de la chapele et vient a son cheval et l'en meine par le frain jus-qu'a la croiz ; puis il oste la sele et le frain et le lesse pestre ; et deslace son hiaume et le met de-vant soi, et oste s'espee et se couche sor son escu devant la croiz et s'endort assez legierement, a ce qu'il estoit las (...)

## La mirakla resanigo

Et quant il s'est grand piece esperiz, si voit venir, en une litiere que portoient dui palefroi, un chevalier malade qui mout se plaingnoit angoissement. Et quant il aproche de Lancelot, si s'arreste et le regarde ne mot ne dit, car il cuide que il se dorme. Et Lancelot ne li dist mot, come cil qui ert en tel point qui il ne dormoit bien ne ne veilloit bien ainz someilloit. Et li chevaliers de la litiere, qui se fu arrestez a la croiz, se comença a plaindre mout durement et disoit : « *Ha ! Diex, faudra me ja mes ceste dolor ? Ha ! Diex, quant vendra li Sainz Vesiaus par qui la force de ceste dolor doit remanoir ? Ha ! Diex, soffri onques mes nus hom autant de mal come je sueffre, et por petit de meffet ?* »

E Lancelot rajdis la tutan trairon del arbaro lau tia maniero ke li sekvas nek vojon nek padon sed allas tiel kiel aventuro lin direktas. E tio faras a li multan penon, ke li vidas nek lontane nek proksime kie li potus preni sian vojon : kor multe estas la nokto obskura. E tamen, tiom li allis ke li venis a kruco el ŝtono kvu estis ĉe l'disiĝo en du vojoj, en dezerta erikejo. E li rigardas la krucon kvan li estis proksima, e vidas apude blokon el marmoro kie estis literoj skribitaj, tio estis lia opinio. Sed la vetero estis tiel obskura ke li ne potis koni kvon ili volis diri. E li rigardas a la kruco e vidas kapelon multe malnovan, e li sin direktas tien kor li kredas trovi homon tie. E kvan li estas tute proksima, tiam li descendas e ligas sian ĉevalon a kverko, e demettas sian ŝildon de sia kolo e ĝin pendigas a la arbo.

Poste li venas a la kapelo e ĝin trovas dezerta e malbonstata, e [ek]eniras tien e trovas ĉe l'enirejo kradojn el fero kvuj estis kunpremitaj e kunigitaj en tia maniero ke oni ne povu facile eniri tien. E li rigardas tra la kradoj e vidas tie ene altaron kvu estis multe riĉe ornamita per drapiraĵoj el silko e aliaj aĵoj, e habis antaŭe grandan kandelabron el arĝento kvu sutenis ses brulantajn kandelojn kvuj ĵetis grandan helecon. E kvan li vidas tion, tiam li havas deziregon eniri tien por scii kvu restadas tie : kor li ne kredis ke en tiel stranga loko potas esti tiel bellaj aĵoj kiel li vidas ĉitie. E li rigardadas la kradojn. E kvan li vidas ke li tien ne potas eniri, tiam li estas tiom afliktita ke li foriras de l' kapelo e venas a sia ĉevalo e ĝin forkondukas per la brido ĝis la kruco ; poste li demettas de ĝi la selon e la bridon e ĝin lasas paŝtiĝi ; e li malligas sian helmon e ĝin mettas antaŭ sin, e demettas sian spadon e kuŝiĝas sur sia ŝildo antaŭ l' kruco e endormiĝas sufiĉe facile, pro tio ke li estis laca (...)

E kvan post granda peco [da tempo] li estas vekiginta, tiam li vidas veni, en portlito kvun portis du bellaj ĉevaloj, malsalvan kavaliron kvu multe plendis angore. E kvan li aproksimiĝas a Lancelot, tiam li haltas e lin rigardas e verbon ne diras, kor li kredas ke li dormas. E Lancelot ne diras verbon a li, kiel iu kvu estis ĉe tia limo ke li ne tute dormis nek estis tute veka, sed dormetis. E la kavaliro del portlito, kvu haltis ĉe l'kruco, komencis plendi multe laŭte e diris : « *Ha ! Deo, ĉu por mo neniam finiĝos ĉi tiu doloro ? Ha ! Deo, kvan venos la Sankta Vazo per kvu la forto de ĉitiu doloro debas ĉesi ? Ha ! Deo, ĉu iam suferis iu homo tiom da doloro kiom mo suferas, e por tiom malgranda malbonfaro ?* »

## VI – La aventuro de Lancelot

Grant piece se complaint einsi li chevaliers et se demente a Dieu de ses maus et de ses douleurs. Et Lancelot ne se remue ne ne dist mot, car il est ausi come entransés, et neporec il le voit bien et entent ses paroles.

Et quant li chevaliers a grant piece atendu en tel maniere, si se resgarde Lancelot et voit venir devers la chapele le chandelabre d'argent que il avoit veu en la chapele o les cierges, et il resgarde le chandelabre qui vient vers la croiz, mes il ne voit mie qui le porte, si s'en merveille trop. Et après voit venir sor une table d'argent le Saint Vessel que il ot jadis veu chiés le Roi Pescheor, celui meismes que len apeloit le Saint Graal.

Et si tost come li chevaliers malades le voit venir, si se lesse chaoir a terre de si haut come il estoit et joint les mains encontre et dit :

*« Biau sire Diex, qui de cest Saint Vessel que je voi ci venir avez fet tant bel miracle en cest país et en autre, Pere, regardez moi par vostre pitié, en tel maniere que cist maus dont je me travail me soit assouagemenz en brief terme, si que je puisse entrer en la Queste ou li autre pseudome sont entré. »*

Et lors s'en vet trainant a la force de ses braz jusq'au perron ou la table seoit et li Sainz Vessiaus desus. Et il se prent a deus mains et se tire contremont e fet tant qu'il bese la table d'argent et la toche a ses euz. Et quant il a ce fet, si se sent ausi come toz alegiez de ses maus : si gite un grant plaint et dit : *« Ha ! Diex, gariz sui ! »* et ne demora gaires que il s'endort.

Et quant li Vessiaus ot une piece demoré ilec, si s'en rala li chandelabres en la chapele et li Vessiaus avec, si que Lancelot ne sot ne a l'aler ne au venir par cui il i pot estre aportez. Et neporquant einsi li avint, ou parce qu'il ert trop pesanz dou travail que il avoit eu, ou par pechié dont il ert surpris, que il ne se remua por la venue del Saint Graal ne ne fist semblant qu'a riens l'en fust ; dont il trova puis en la Queste qui mainte honte l'en dist et assez l'en mesavint en maint leu.

Grandan pecon [da tempo] tiel plendadas la kavaliro e lamentas a Deo pri siaj suferoj e siaj doloroj. E Lancelot ne movas sin nek diras verbon, kor li estas kiel mort-ŝtoniĝanta, e tamen li bone vidas lin e odas liajn parolojn.

E kvan la kavaliro grandan pecon atendis en tia maniero, tiam Lancelot rigardadas ĉirkaŭen e vidas veni de la kapelo la kandelabron el arĝento kvun li vidis en la kapelo kun la kandeloj, e li rigardas la kandelabron kvu venas a la kruco, sed li tute ne vidas kvu portas ĝin, tial li tre miras pri tio. E poste li vidas veni sur tablo el arĝento la Sanktan Vazon kvun li iam vidis ĉe l'Reĝo Fiŝisto, tiun mem kvun oni nomis la Sankta Gralo.

E tiel frue kiel la malsalva kavaliro ĝin vidas, tiam li lasas sin sinki teren de tiel hote kiel li estis, e kunigas la manojn unu kontraŭ la alia e diras :

*« Bella sinjoro Deo, kvu per ĉitiu Sankta Vazo kvun mo vidas ĉitien veni, faris tiom da bellaj mirakloj en ĉitiu lando e en aliaj, Patro, rigardu min pro via pitio, en tia maniero ke ĉitiu doloro per kvu mo turmentigas baldaŭ por mo mildiĝu, tiel ke mo potu eniri en la Serĉadon, kien la aliaj noblomoj eniris. »*

E tiam li allas, sin trenante per la forto de siaj brakoj, ĝis la bloko kie staras la tablo e la Sankta Vazo sur ĝi. E li sin akroĉas ambaŭmane [a la bloko] e sin tiras supren e faras tiom ke li kisas la tablon el arĝento e tuŝas ĝin per siaj okuloj. E kvan li estis tion farinta, tiam li sentas sin tiel kiel tute liberigita el siaj doloroj : tiam li ĵetas grandan krion e diras : *« Ha ! Deo, mo estas resalvigita ! »*, e preskaŭ tuj li endormiĝas.

E kvan la Vazo estis pecon [da tempo] tie restinta, tiam reallas la kandelabro en la kapelon e la Vazo kun ĝi, tiel ke Lancelot sciis nek ĉe l'allo nek ĉe l'reveno, per kvu ĝi potis esti tien aportita. E tamen tiel okazis a li, aŭ kor li estis tro peza pro la peno kvun li estis habinta, aŭ pro peko de kvu li estis surprizita, ke li ne movis sin por l'veno del Sankta Gralo nek esprimis per sia mieno ke tio iel estis grava por li ; pro kvo li trovis poste en la Serĉado iun kvu diris a li multe da honto pri tio, e sufiĉe malbonokazis a li el tio en multe da lokoj.

*(daŭrigo sur la sekva paĝo)*

### Leksikono de la praesperantaj vortoj

a	al
alli	iri
bella	bela
e	kaj
debi	devi
Deo	Dio
habi	havi

hota	alta
kor	ĉar
kva	kia
kvan	kiam
kvo	kio
kvu	kiu
lau	laŭ

ma	mia
mandi	demandi
metti	meti
mo	mi
nuk	nun
odi	aŭdi
os	ankaŭ

pitio	kompato
pondi	respondi
poti	povi
salva	sana
suteni	subteni
verbo	vorto
vo	vi

## La forpreno de la armiloj

Quant li Sainz Graalz se fu partiz de la croiz et entrez en la chapele, si se dreça li chevaliers de la litiere sainz et haitiez et besa la croiz. Et maintenant vint ilec un escuiers qui aportoit unes armes mout beles et mout riches ; et vet la ou il voit le chevalier, si li demande coment il li est avenu.

« Par foi, fet il, bien, Dieu merci : je fui tantost gariz come li Sainz Graalz me vint visiter. Mes merveille me semble de cel chevalier qui la se dort, qui onques ne s'esveilla de sa venue. »

– « Par foi, fet li escuiers, ja est aucuns chevaliers qui maint en aucun grant pechié dont il ne se fist onques confès, dont il est par aventure si cor-pables vers Nostre Seignor que il ne li plaist mie qu'il veist ceste bele aventure. »

– « Certes, fet li chevaliers, qui que il soit, il est meschaanz ; et si cuit je bien que ce soit aucuns des compaignons de la Table Reonde qui sont entré en la Queste dou Saint Graal. »

– « Sire, fet li escuiers, ge vos ai voz armes aportees, si les prenez quant vos plaira. » Et li chevaliers li respont que d'autre chose n'avoit il mestier. Si s'arme et prent les chaucés de fer et le hauberc. Et li escuiers vient a l'espee Lancelot, si li baille et le hiaume ausi, puis vient au cheval Lancelot et li met la sele et le frain. Et quant il l'ot apareillié, si dist a son seignor :

« Sire, montez : que a bon cheval ne a bone espee n'avez vos mie failli. Certe, ge ne vos ai chose bailliee qui mielz ne soit employee en vos que en cest mauvés chevalier qui ci gist. »

La lune estoit levee bele et clere, car ja ert passee la mie nuit. Et li chevaliers demande a l'escuier coment il conoist l'espee ; et cil li dit que il la cuide bien conoistre a la biauté que ele a : et il l'ot ja trete dou fuerre, si l'avoit trouvee si bele que il l'avoit trop couvoitiee. Et quant li chevaliers fu apareilliez et montez el cheval Lancelot, si tent la main vers la chapele et jure que, se Diex li ait et li saint, il ne finira ja mes d'errer devant que il savra coment ce est que li Sainz Graaux s'apert en tanz leux ou roiaume de Logres, et par qui il fu aportez en Engleterre et por quel besoign, se aucuns autres n'en set ainz de lui veraies noveles.

« Si m'ait Diex, fet li vaslez, assez en avez dit. Or vos doit Diex a honor partir de ceste Queste, et a sauveté de l'ame : car certes sanz peril de mort ne la poez vos mie longuement maintenir. »

– « Se ge i muir, fet li chevaliers, ce sera plus m'anors que ma honte. Car a ceste Queste ne doit refuser nus preudons ne por mort ne por vie. »

Et lors se part de la croiz entre lui et son escuier, si emporte les armes Lancelot et chevauche si come aventure le meine.

Kvan la Sankta Gralo estis foririnta de l'kruco e enirinta en la kapelon, tiam stariĝis la kavaliro del portlito, salva e kuracita, e kisis la krucon. E nuk tien venas ŝildisto kvu aportis armilojn multe bellajn e multe riĉajn ; e li allas tien kie li vidas la kavaliro, tiam mandas a li kiel tio okazis a li : « *Je ma fido, li pondas, bone, dankon a Deo : mo estis tiel frue resalvigita kiel la Sankta Gralo min venis viziti. Sed mirindaĵo ŝajnas a mo tiu kavaliro kvu tie dormas, kvu neniam vekigis pro ĝia veno.* »

– « *Je ma fido, pondas la ŝildisto, jen estas iu kavaliro kvu restadas en granda peko kvun li neniam konfesis, pro kvo li estas, per aventuro, tiel kulpa kontraŭ Nia Sinjoro ke ne plaĉis a li ke li vidu ĉitiun bellan aventuron.* »

– « *Certe, pondas la kavaliro, kvu ajn li estu, li estas malbona ; e tamen mo tre kredas ke li estas iu el la kompanoj del Ronda Tablo kvuj eniris en la Serĉadon del Sankta Gralo.* »

– « *Sinjoro, pondas la ŝildisto, mo aportis a vo viajn armilojn, tial prenu ilin kvan plaĉos a vo.* » E la kavaliro pondas a li ke pri io alia li ne habas bezonon. Tiam li sin armas e surmettas la kuloton el fero e la maŝkuton. E la ŝildisto venas a la spado de Lancelot, tiam li ĝin aportas a li e os la helmon, poste li venas a la ĉevalo de Lancelot e mettas sur ĝin la selon e la bridon. E kvan li finpretigis ĝin, tiam li diras a sia sinjoro : « *Sinjoro, surĉevaliĝu : kor nek a bona ĉevalo nek a bona spado vo iam malfidelis. Certe, mo ne aportis a vo ion kvo ne estos pli bone uzata ĉe vo ol ĉe ĉitiu malbona kavaliro kvu ĉitie kuŝas.* » La luno estis leviĝinta bella e klara kor jam estis pasita la mezo del nokto. E la kavaliro mandas a la ŝildisto kiel li konas la spadon\*.

E tiu diras ke li tre kredas koni ĝin pro la belleco kvun ĝi habas : e li estis jam ĝin eltirinta el la ingo, tiam li estis trovinta ĝin tiel bella ke li estis ĝin tre avidinta. E kvan la kavaliro estis preta e grimpinta sur l'ĉevalon de Lancelot, tiam li etendas la manon a la kapelo e ĵuras ke, se Deo lin helpas, e la sanktuloj, li neniam ĉesos vagi, antaŭ ol scii kial tio estas ke la Sankta Gralo aperas en tiom da lokoj en la reĝlando de Logres, e per kvu ĝi estis aportita en Englujon e por kva afero, se neniu alia, antaŭe ol li, ekscias pri ĝi verajn novaĵojn. « *Tiel min helpu Deo, pondas la ŝildisto, vo plene parolis pri tio. Nu, Deo domu a vo honore fini ĉitiun Serĉadon, e savige por l'animo : kor certe sen risiko morti vo ne potos longe ĝin suteni.* » – « *Se mo mortos en ĝi, pondas la kavaliro tio estos pli ma honoro ol ma honto. Kor ĉitiun Serĉadon debas rifuzi neniu noblomo, nek por morto nek por vivo.* » E tiam li foriras de l'kruco kune kun sia ŝildisto, e li kunportas la armilojn de Lancelot e rajdas tiel kiel aventuro lin direktas.

## La vekigo de Lancelot

Et quant il se pot bien estre esloigniez de mie liue et plus, si avint que Lancelot se leva en son seant come cil qui lors a primes s'estoit esveilliez dou tout. Si se porpense se ce qu'il a veu a esté songes ou veritez, car il ne set s'il a veu le Saint Graal ou se il l'a songié. Et lors se drece et voit le chandelabre devant l'autel, mes de ce qu'il plus voudroit veoir ne voit il riens, ce est dou Saint Graal, dont il voldroit savoir veraies noveles s'il pooit estre.

Quant Lancelot ot grant piece resgardé devant les prones por savoir se il verroit riens de la chose que il plus desirroit, si ot une voiz qui li dist :

« *Lancelot, (...) coment fus tu si hardiz que tu ou leu ou li Sainz Graalx reperast osas entrer ? Va t'en de ci, cat li leux est ja toz empulentez de ton repere.* »

Et quant il ot ceste parole, si est tant dolenz qu'il ne set que il doie fere. Si se part maintenant d'iluec sospirant dou cuer et lermoiant des eulz, si maudit l'ore qu'il fu nez, car se set il bien qu'il est venuz au point qu'il n'avra ja mes honor, puis qu'il a failli a savoir la verité del Saint Graal. (...)

Et quant il est venuz a la croiz, si ne troeve ne son hiaume ne s'espee ne son cheval : si s'aparçoit maintenant qu'il a veu verité. Et lors comence un duel grant et merueilleux, et se clame chaitif dolent et dit :

« *Ha ! Diex, or i pert mes pechiez et ma mauvese vie. Or voi je bien que ma chetivetez m'a confondu plus que nule autre chose. Car quant je me deusse amender, lors me destruit li anemis, qui m'a si tolue la veue que je ne pui veoir chose qui de par Dieu soit. Et ce n'est mie de merueille se je ne puis veoir cler : car des lors que je fui primes chevaliers ne fu il hore que je ne fusse coverz de teniebres de pechié mortel, cat tout adés ai habité en luxure et en la vilté de cest monde plus que nus autres.* »

Einsi se despit et blasme Lancelot mout forment et fet son duel toute la nuit. Et quant li jorz parut biaux et clers et li oiselet comencerent a chanter parmi le bois et li soleux comença a luire parmi les arbres, et il voit le biau tens et il ot le chant des oisiaus dont il s'ert maintes foiz esjoiz, et lors se voit desgarni de toutes choses, et de ses armes et de son cheval, et bien set de voir que Nostre Sires s'est corrociez a lui ; si ne cuide ja mes venir a cel point qu'il truiest chose ou monde qui sa joie li poïst rendre. Car la ou il cuidoit joie trover et toutes honors terrianes a i failli, ce est as aventures dou Saint Graal ; et ce est une chose qui mout le desconforte (...)

E kvan li estis foririnta eble duonan leugon e pli, tiam okazis ke Lancelot leviĝis siden kiel iu kvu tiam ĵus tute vekigis. Tiam li pripensas ĉu kvon li vidis estis songo aŭ vero, kor li ne scias ĉu li vidis la Sanktan Gralon aŭ ĉu li songis ĝin. E tiam li stariĝas e vidas la kandelabron antaŭ la altaro, sed de kvon li plej volus vidi, li vidas nenion, tio estas del Sankta Gralo, pri kvu li volus ekscii verajn novaĵojn se tio potus esti.

Kvan Lancelot estis grandan pecon [da tempo] rigardinta, antaŭ la kradoj, por scii ĉu li vidos ion de la aĵo kvun li plej dezirus, tiam estis voĉo kvu diris a li : « *Lancelot (...), kiel ci estis tiel impertinenta, ke ci, en la lokon kie la Sankta Gralo restis, aŭdacas eniri ? Foriru de ĉitie kor la loko jam estas tute fetorigita de cia restado.* »

E kvan li odas ĉitiun parolon, tiam li estas tiom trista ke li ne scias kvon li debas fari. Tiam li tuj foriras de tie, sopirante el l'koro e plorante el l'okuloj, e malbenas la horon de sia naskiĝo, kor li bone scias tion, ke li venis ĝis la punkto ke li neniam habos honoron, tial ke li malsukcesis scii la veron del Sankta Gralo (...)

E kvan li estas aveninta a la kruco, tiam li trovas nek sian helmon nek sian spadon nek sian ĉevalon : tiam li tuj ekkonscias ke li vidis veron. E tiam li komencas funebtron grandan e mirindan, e laŭte konfesas sin trista [anim-]malfirmulo e diras :

« *Ha ! Deo, nuk ĉitie aperas ma peko e ma malbona vivo. Nuk mo bone vidas ke ma malfirmeco damaĝis min pli ol io alia. Kor kvan mo debintus pliboniĝi, tiam min detruis la Malamiko kvu tiel forprenis de mo la vidon ke mo ne potas vidi kvo per la Dea volo estas. E tio ne estas mirinda se mo ne potas klare vidi : kor ekde kvan mo estis ĵus armita kavaliro, ne estis horo dum kvu mo ne estis kovrita de tenebroj de morta peko, kor tute senĉese mo restadis en voluptamo e en la malnobleco de ĉitiu mondo pli ol iu ajn alia.* »

Tiel Lancelot sin riproĉas e mallaŭdas multe forte e faras sian funebtron dum la tuta nokto. E kvan la tago aperis bella e klara e la birdetoj ekkantis en la arbaro e la suno ekbrilis inter la arboj, e li vidas la bellan veteron e li odas la kanton del birdoj pro kvo li estis multajn fojojn ĝojinta, e tiam vidas sin senigita de ĉio, e de siaj armiloj e de sia ĉevalo, e bone scias vidi ke Nia Sinjoro koleriĝis kontraŭ li ; tiam li kredas neniam veni a tiu punkto ke li trovos ion en la mondo kvo lian ĝojon potos redoni a li. Kor tie kie li kredis trovi ĝojon e ĉiujn terajn honorojn, li malsukcesis, tio estas ĉe l'aventuroj del Sankta Gralo, e tio estas io kvo multe lin malkonsolas.

\* T.e. : *konas ke ĝi estas bona.*

# Enkonduko en Ajurvedon

*Namaste* : mi salutas Dion en vi !

Dum joga kurso mi interkonatiĝis kun nepala monaĥo. Li kompilis masaĝ-teknikon bazitan sur la antikvaj hindaj libroj. Kiel flegistino mi tre interesiĝas pri kuracmetodoj. Do mi decidis sekvi la anoncitan kurson kaj elektis familianojn kaj amikinojn kiel ekzercomaterialon.

Mi klopodos doni al vi enkonduketon en la saĝecon, kiu Ajurvedo estas. Mia sola intenco estas igi vin scivolemaj pri la vastaj kono kaj saĝeco de alia pens- kaj viv-maniero el Hindio.

Kio plej intrigas min, tio estas la paralaleco kiun mi ofte konstatas inter la vedaj skribaĵoj kaj la [kristana] Sankta Skribo. Ĉu ne ĉiu saĝeco fluas el la samaj fontoj, el LA FONTO kapitale skribita ?

Mi komencu per klarigo pri la vorto Ajurvedo. Nu, ĝi devenas el la tre antikva lingvo sanskrito : *ayus* signifas vivon, kaj *veda* signifas konon. Ajurvedo, sekve, volas diri : "*scienco de la vivo*".

## Kio estas Ajurvedo ?

Ĝin bildigas kvinpetala floro kiu simbolas feliĉan vivon. La kvin petaloj prezentas : sintenojn, malstreĉiĝon, mensan forton, spiradon kaj nutraĵon /purigon. Do, estus via propra kuracisto dank'al la ajurveda vivmaniero !

Eble vi scias ke la plej antikva sistemo kuracarta, nomita Ajurvedo, eĉ ĝis en nia tempo sukcesplene kaj minimumkoste estas praktikata en Hindio. Unu el la plej grandaj pensuloj ajurvedaj, **Suŝruta**, skribis : "*Sana persono estas tiu kies tri principoj de la korpo estas ekvilibras kaj harmonias : ties sensorĝano kaj animo havas bonan san-staton.*"

Kiuj estas tiuj tri principoj de la korpo ? *Vāju* (aero : nerva kaj hormona sistemo), *Pitta* (fajro : sistemo de digesto kaj enzimoj), *Kapha*<sup>1</sup> (akvo : sistemo koncernanta ĉiujn fluidaĵojn).

La vivo celas kontentigi kvar fundamentajn dezirojn, kiuj validas por ĉiuj homoj : *Dharma* (la ĝusta agmaniero), *Artha* (materia riĉeco), *Kāma* (monda plezuro kaj reproduktado), *Mokŝa* (spirita libereco). Nur bona sanstato povas sukcese garanti la efektiviĝon de ĉi tiuj kvar celoj. La uzado de mineraloj kaj plantoj, kiel ankaŭ ekvilibra nutrado, faras Ajurvedon plene natura kuracmaniero.

Ajurvedo estas priskribita en la sanktaj libroj de Hindio kaj Nepalo. Tiuj libroj nomiĝas Veda literaturo. En tiu literaturo oni povas legi la pensojn kaj spertojn travivitajn de la Riŝioj. Ili estas viziuloj kiuj sin okupis i.a. pri la demando : ĉu la naturo estas unu ? Ĉio ja kundependas kun ĉio !

Mi prezentu metaforon el la Veda literaturo kiel ekzemplon : pensoj estas kiel la ondoj de la maro ; ili leviĝas kaj malleviĝas kaj vidas nur la propran movadon. La maro kaj la ondo estas nedisigeblaj : ne gravas tio, kion la ondoj pensas. Sed kiam la ondo kvietiĝas, ĝi tuj spertas ke ĝia deveno estas la maro. Kaj poste ĝi konsciiĝas pri tio, ke ĝi mem estas la maro. Gravus, ke la spirito ne identigu sin plu kun la ondo sed kun la maro. Ĉu ne pensige ?

La Riŝioj vivis pli ol 1500 jarojn antaŭ Kristo, laŭdire eĉ antaŭ ol oni konstruis la egiptajn piramidojn ! Dum la jarcentoj, multaj iliaj pensoj kaj travivaĵoj perdiĝis ; multo tamen restis konservita en la Veda literaturo kaj en hejma uzado. Same niaj avinoj kaj praavinoj havis profundan scion ne nur pri kuracmetodoj el plantoj sed ankaŭ pri, ekzemple, "magio".

Ajurvedo vidas la homon kiel unuon, kiel parton de la kosmo, eĉ kiel la kosmon mem. Ĝi ja distingas inter psiko kaj korpo, sed nepre ne apartigas la psikon disde la korpo. Se la korpo malsanas, same ankaŭ la psiko malsanas. Kaj reciproke

Bedaŭrinde, dum la Renesanca periodo en okcidento, oni disigis la korpon de la psiko. Pro tio nuntempaj kuracistoj kiuj studis medicinon en niaj regionoj pririgardas nur partojn de la korpo aŭ de la menso. Pro daŭra specialigo, ĉiam pli malgranda parto estas ekzaminata.

Laŭ la Veda vidmaniero, menso kaj korpo, kiel dirite, estas nedisigeble interligitaj, kiel la ondo kun la maro. Oni ne povas paroli pri la menso sen la korpo, kaj reciproke.

## Interdependeco kun la medio

La Ajurveda kuracisto vidas la malsanan homon en lia mondo ; li esploras ĉiujn faktorojn malsanigajn : kio generas la malsanon ? kia estas la rezistokapablo ? kiom aĝas la persono ? kia estas la manĝokulturo ? en kiu tempo de la jaro ni troviĝas ? kiuj estas la ĉiutagaj kutimoj ? k.t.p.

Ĉe tiu punkto mi povas noti ke malsano ne estas homa kulpo, sed ke la homo ja partoprenas en ĝi. La malsanulo mem povas fari multon por progresigi sian resaniĝon aŭ almenaŭ plibonfarton, i.a. per la tekniko de la prasonoj, meditado, adekvata nutrado.

Rilate al ĉi tiu lasta punkto mi emfazu ke Ajurvedo ne prijuĝas nutraĵojn surbaze de kaloria valoro, sed laŭ bona gusto, digestiga efiko kaj influo al la psiko. Tiel ĝi distingas inter nutraĵoj



gajaj kaj tristaj. Gajaj nutraĵoj estas i.a. lakto, kokinaĵo, verdaj legomoj ; ili aktivigas materion kun pozitiva influo ; dum tristaj nutraĵoj, i.a. sukrozoj kaj grasoj, negative influas la homon.

La kuracistoj de la antikva Hindio estis samtempe grandaj saĝuloj, kaj ilia plej grava konvinko estis ke la korpo kreiĝis el konscio. Iliaj kuracmetodoj penetris la materion ĝis la kerno de la spirito, al pli profunde lokita realo. Ajurvedo tuŝas pli suban tavolon en la homa naturo. La tie kolektita kono ne radikas en teknologio sed en saĝeco. Do, se ni scias kie estiĝas malsano, ni ankaŭ scias kien ni iru por kuraci ĝin. Ĉi ĉion aŭdinte vi eble komprenos ke "miraklaj saniĝoj" eble ne estas pli ol kompleksigo de niaj normalaj povoj.

### **La Banko de Dio**

Mi donu ekzemplon pri hinda metodo de kuracado kiun mi spertis kiam mi vizitis en Hindio la "Bankon de Dio". Tia banko troviĝas i.a. en la urbo Varanasi, kien Sŭamio Joganando, kun kiu ni grupe vojaĝis, enkondukis nin. Al tiu banko direktas sin homoj kiuj suferas aŭ havas problemojn. Plej ofte ili venas kun la tuta familio. Ili parolas pri siaj problemoj, kaj poste stariĝas kontrakto inter la banko kaj la familio. La kontrakto enhavas jenan interkonsenton : dum 250 tagoj la familio devas ĉiutage skribi la nomon *Râma*<sup>2</sup> 500-foje, kaj la "bankoficisto" preskribas dieton kaj meditadon. Post 250 tagoj la familio revenas kaj donas la skribitajn nomojn *Râma* al la oficisto, kiu envolas la skribaĵojn en ruĝan tukon por enmeti ilin en grandegan ŝrankon. Pro la fakto ke tiuj homoj sin direktas al alia dimensio, la problemoj plej ofte jam estas solvitaj.

Ankoraŭ alian belan metaforon mi havas por vi en mia stoko : Vivo, do ankaŭ la homa vivo, fluas kiel rivero ; se la fluo renkontas obstaklon la homo sentas doloron ; la fluado haltas. Donante atenton al la doloriga loko kiu krias por atento, la homo rimarkas ke la obstaklo sin solvas, kaj la fluo denove povas iri sian vojon. Ĉu ne vere penso pensiga ?

### **Ajurveda masaĝo**

Kial do ĉi tiu masaĝo ? Nu, la ĉefa celo de la masaĝo estas preventa, por ke la korpo kaj la spirito de la homo restu elastaj, malstreĉitaj kaj sanaj.

Kio do estas saneco laŭ ajurveda vidpunkto ? Saneco estas la stato de korpo kaj spirito kiuj funkcias tiel ke ili kapablas laŭcele kaj ĉiudirekten energii. Por resti sana homo Ajurveda atribuas grandan valoron al prevento prefere ol kuraco, fortigo de la korpo por kontraŭstari malsaniĝon, mensa energio kaj psika kapableco.

Karakterize por ĉi tiu tipo de masaĝo estas, ke la homo mem plene respondu pri la propra sano. Nia kutima ŝablono estas aga - reaga, t.e. ni malsaniĝas kaj atendas resanigon sekve de vizito al kuracisto. La respondo, laŭ ajurveda pensmaniero, kaŝiĝas en ni mem, en la homa sinteno. Por tio multe da kono estas bezonata ; se ni deziras resti sanaj homoj ni devas koni nin mem sur ĉiuj niveloj, tio estas : fizika, astrala kaj kaŭza. En sia praktiko la masaĝist(in)o boratingas kaj harmoniigas ĉi tiujn tri nivelojn.

Antaŭ ol la masaĝo komenciĝas, la masaĝisto kaj la masaĝoto mense sin direktas al la Eternulo, aŭ almenaŭ mense unuigas sin kun la kosmō.

La ajurveda masaĝo ĉefe celas progresigi la trafluigadon de limfaĵ- kaj sangovojoj. Gravas, kompreneble, ke la kliento dum la masaĝo ne endormiĝu sed donu maksimuman atenton. Estiĝas ĉi tie du fortoj, nome la mensa forto de la kliento kaj la forto rezultanta el la masaĝistaj manoj. Tiu duo estigas novan energion, kosman energion, kiu vere sanige efikas. La masaĝisto kaj la masaĝato iĝas, por tiel esprimiĝi, unu. Ambaŭ sin provizas per energio.

La masaĝo kutime fariĝas surplanke ; origine, en Hindio, ĝi okazas en familia rondo. Oni uzas olivoleon kaj eterajn oleospecojn kiuj efikas profunden. Lavendo rezultigas puriĝon.

La ajurveda masaĝo ne estas direktita al malsanoj plimilpli gravaj, sed al ilia prevento. Krome ĝi efektivas ke la homo sentu sin bone.

La tekniko konsistas el nombro de diversaj agoj : elverŝi kaj enmasaĝi la oleon ; elpeli uzitan energion ; enigi novan energion ; tordi, knedi, haki (tio estas kvazaŭ torturo, sed ne estas !) ; akupremi ; doni atenton pri spirado kaj digesta centro ; harmoniigi la energi-nodojn (ĉakrojn).

La tuta korpo estas tiel tuŝata, t.e. de la kapo ĝis la piedoj. Kompleta terapio daŭras proksimume unu horon kaj kvaronon ; sed tiam oni poste sentas sin kiel homon renaskitan !

Nun mi venas al la fino de mia enkonduko\* kaj aŭdacas demandi al vi ĉu mi iomete vekis vian apetiton ? Al tiuj kiuj diros "*por mi vi parolis volapuke*", mi konsilas legi la vere interesan libron de Dîpak Chopra pri kvantum-kuracado. Li certe malfermos ankaŭ antaŭ vi mondon tute novan, mondon kiu limas tiun de Ajurvedo !

**Vera Tuinder Dekker**

\* Temas pri teksto de prelego, farita ĉe la eku-  
mena *Kristana Kongreso* en Viviers (julio 1993).

1/ Ni ĝustigis la sanskritajn vortojn ĉar la preleg-teksto mem hezitis : *vat, pit/pitt, kaf/kaph* kaj *mokta/moktcha*.

2/ Unu nomo de Dio, murmurita, ekz-e, de Gandhi mortanta.

# Gusto de akvo

( Por verŝi en la debaton de la venonta IRKE pri « Integreco de la sano fizika, psika kaj spirita » )

Malriĉa junulo suferis de tuberkulozo. Li kuŝis en la lito trankvile en malgranda ĉambro plene malfermita (...) Li pasigis tagojn kun la koro dankema, trinkante sufiĉe da akvo. La vera sanigado ne troviĝas krom en tiu ĉi sintenado. Kiam li ekkomprenis la esencon de tiu ĉi resanigado, bonkora homo vizitis lin : « Akvo ? » ..... « Ĉu vi trinkas akvon kontraŭ la terurinda tuberkulozo ? Tio estas tute anakronismo, ĉu ne ? »

La D-ro A. , kiu estis sendita al la malsana junulo (...) diris ke li estas surprizita :

« Se domo rompiĝas, ĉarpentisto riparas ĝin. Ŝipo estas plibonigita en la doko kiel oni deziras. Se homo malsaniĝas, li estas resanigita per medikamentoj kaj injektoj de la kuracisto. La resanigo de malsano per akvo estas la opinio de frenezulo de akvo, ĉu ne ? »

Li rapide demandis al la familia kuracisto, D-ro B., maltrankviliginte pro la diraĵo de D-ro A. : « Domo kaj ŝipo estas faritaj de homo. La vivo estas la nesolvebla enigmo en la mondo, kie la scienco mirige progresis. La pordo al la sekreto de la vivo estas iomete malfermita. La medicino progresis ja. Sed kiom da malsanoj kuracisto povas tutcerte resanigi ? Nur kelkaj malsanoj estas sanigeblaj, kaj eĉ ne senkondiĉe. Do la kuracisto ne estas bezonata, ĉu ? »

– « Mi estas hontema en mia koro, esplorante malsanulojn ĉiutage. **Hipokrato** diris : « La Malsanuloj estas kuracigataj per la natura forto, sed la rekompenco estas ricevata de la kuracistoj ». Tio pikas al mi la bruston. La malsanoj estas nekuraceblaj per la homo, sed ili estas nature kuraceblaj. Eĉ se ni traktos ilin kontraŭnature pro nia malprofunda scio, ili estos resanigeblaj per la natura forto. La medicino resanigas la resanigeblajn malsanojn sed neresanigeblaj malsanoj estas senhelpaj. Oni nomas tiun ĉi naturan resanigan forton la natura kapablo. La esenca punkto de kuracado estas funkciigi tiun kapablon plej bone. Pro tio oni devas kompreni la veran forton de la naturo, forĵetante la homan saĝecon kiel eble. Enspiru sendomaĝe la aeron, suprenrigardu la sunon, trinku kun granda dankemo sufiĉe da akvo kaj domaĝu la veran forton kuŝante en la lito trankvile. Manĝu laŭ natura apetito. La manĝado estas pli grava ol la elekto de manĝaĵo. La reveno al la naturo estas la senbedaŭra ricevado de la natura donacaĵo, kaj trinkado de la akvo estas la plej grava inter ili.

« Nuntempe homoj estas tiel iluziaj ke ili mokridas tiujn kiuj konsilas enspiri la aeron kaj laŭdas tiujn kiuj malpermesas trinki la akvon. Oni bezonas sufiĉe da strebado por venki la teruran kutimon ne trinki la akvon. Akvo ne estas la anstataŭaĵo de la medikamentoj. Tio estas reveni tra la akvo al la naturo, kie estas la gusto de akvo. »

La junulo komencis denove trinki la akvon. Li komprenis la nerimarkitan signifon de la trinkado de la akvo. Li komprenis la guston de akvo, mi pensas.

Iu vilaĝa mezaĝa sinjoro aperis en mia konsultejo. Li prezentis al mi multe da kaŝtanoj, kiuj ŝajnas esti loka specialaĵo. « Mi venis danki vin. » « Mi tute ne konas vin. » « Mi estas paciento prizorgita de vi antaŭ dek jaroj. Mi petis vian diagnozon, supozante ke mi suferis de severa malsano. Sed tamen mi ricevis vian diagnozon ke mi estas senmalsana. Ricevinte de vi la preskribon « Trinku akvon kun dankemo », mi reiris al la vilaĝo. Reveninte mi fosis fonton, kiu spruĉis senĉese freŝan akvon. Mi dankas vin kore. »

Tiu ĉi homo estis kredanto de *Nembucuo*.

## Ekzistas tri tipoj de malsanuloj

La unua estas la tipo de la ordinara homo (...) La dua tipo estas neordinara homo kiu havas neniom el malsanulo kvankam li estas fatale malsana. La tria estas la tipo de la iluzia homo, kiu ŝajnigas sin grava malsanulo kvankam li havas nenian malsanon. Malsanuloj el la tria tipo estas pli multaj en la mondo ol oni supozas. Tiuj estas bonvolemaj kredantoj de la falsa religio havanta influon ankaŭ sur la mondon :

Jen estas grava afero, se la malsanoj atakas la mondon. La homoj ne povas esti trankvilaj sen la medikamentoj kaj injektoj. La kuracistoj defendas ankaŭ per ili. La duatipaj homoj, kiuj rigardas la batalon de la flanko, komencas la propagandon dirante ke la medikamento estas nur ludilo, ke la malsanoj ne ekzistas origine. Ĉe tio la triatipaj homoj estas enfermitaj en dilemo. Ili ankaŭ estas sen-rezonaj en la batalmanieroj, ĉar ili forĝesis ke en la aferoj troviĝas limo de efikeco. Ju pli oni profundigis en la scio, des pli bone oni povas vidi la limon de fortoj :

Malamika batalŝipo, **ekzemple**, malproksime aperis en la maro, 5.000 metrojn for de nia bordo. Niaj pafilegoj bedaŭrinde havas nur la atingodistancon de 3.000 metroj. La pafistoj ĉiuokaze komencas la salvojn kontraŭ la malamiko. Sed eĉ ne unu pafilo trafas la malamikan ŝipon, kaj kiam nia forto elĉerpiĝas, ni estas venkataj de la malamiko. La « duatipa » taktikisto diras ke li batalos kun la manoj malplenaj, ĉar li pensas ke la pafilego estas ludilo, kio devenas de la eraro ke ties esenco estas ignorita de li.


Kiam la malamika batalŝipo alproksimiĝas al la atingodistanco de 3.000 metroj, ni komencas pafi ĝin. La pafilego certe trafas. La scienco estas serioza. Ĝi ne estas erara, sed ĝi nur havas limon de efikeco. La pafisto devas ne esti blinda. Kia ajn ekzakta pafilego egalas al ludilo se ĝi estas blinde uzata. La medicino estas serioza. Se la manoj estas malpurigitaj, la medicino vundas la homon kiu bezonas la esploron pri si mem. Estas la mano de la homo, kiu purigas aŭ malpurigas la scion. Se oni vidas la limon de ties forto, oni serĉas super la scio la mondon kie troviĝas la gusto de akvo (...)

**TAHARA Ken**

(el *La Japana Budhano* n-ro 284, feb.96, p.19-22)

## Kio estas *Amikaro Bruno Gröning* ?

Mi malkovris ĝin dum la *Universala Kongreso* en Valencio, en 1993. Ĝi estas transnacia asocio naskiĝinta en Germanio, kie vivis Bruno Gröning.



Ĝi celas diskonigi la instruon de tiu elstara viro. Tiu instruo intencas helpi la homojn spontanee resaniĝi per akcepto de la tiel dirita "*resaniga kurento*" kun psika kaj fizika sinteno de optimismo kaj malfermo al la pozitivaj ideoj, al la beleco de la mondo, eventuale por kredantoj al la Dia amo.

La *Instrua letero de Bruno Gröning* aperas en pli ol dekkvin lingvoj, el kiuj esperanto.

Multaj komunumoj de la *Amikaro* ekzistas en Germanio, sed ankaŭ en aliaj landoj. Ili celas kuraĝigi la homojn sur la vojo al resaniĝo kaj pli ĝenerale al feliĉa vivo.

Multaj sukcesraportoj atestas pri efikeco de la metodo ; se ili ne ĉiam vere konvinkas, foje ilia impona karaktero elvokas la vorton "*miraklo*" kvankam la signifo de tiu vorto estas elasta. Entute la nombro kaj ofta vigleco de spontaneaj resaniĝoj ĉe la amikaro de Bruno Gröning konfirmas la ĝustecon de tiu instruo, pri kiu Bruno Gröning diras : "*Ne kredu, sed mem spertu*".

**François Degoul\***

\* Partoprenanto en la *Amikaro*, tradukas en esperanton artikolojn por la *Instrua letero*. Kontaktadreso : 54 rue des Caillots, FR-93100 Montreuil (Francio).

## Leteroj de legantoj

1994 08 29

En **Aŭstralio** estas printempo de la 1-a de septembro ĝis la 30-a de novembro : eble estus bone ne dati la gazeton laŭ la sezonoj (...)

Mi permesas al mi enmeti en la koverton nian broŝuron pri *Somerkurso* en Adelajdo, mia urbeĝo. Eble plaĉus al vi, aŭ iuj el viaj amikoj, partopreni. Se jes, ni eble povus aranĝi kunvenon interreligian. Fakte ĉiujare la esperantistoj en Adelajdo aranĝas somerkursaron. Dum la dimanĉa mateno oni havas interreligian diservon, en kiu la plej multa tempo estas silentado, ĉar ni prunteprenas kunvenejon de la kvakeroj. Sed ni permesas al ĉiuj paroli en kiu ajn lingvo, laŭ la bontrovo, kaj estas tre interese kiom da opinioj estas esprimataj. Iam mi mem parolis en la sanskrita (tre malbone, kompreneble, nur kvar linietojn), en la sveda, iom pli bone, en la dana, tute bone, kaj en Esperanto. Mi parolis pri la ordono de Kriŝno : ke Li ne akceptas viandon, alkoholaĵon, fumajn, kafon ktp. Kiel vi povas imagi neniuj reagis. Neniu volas forlasi siajn sensuĝojn kaj servi Kriŝnon. Ili preferas sekvi siajn proprajn ideojn, eĉ kiam tio signifas ke senhelpaj bestoj devas esti mortigataj kaj manĝataj.

La sekvan somerkurson mi ne partoprenis en la diservo. Sed se venus iuj de ASISTI, mi certe partoprenus denove. Ĉu vi aŭdis la bonegan novaĵon ke UEA fine oficiale akceptis la inviton de AEA, veni kaj havi sian UK en Adelajdo en julio 1997 ? (...) Almenaŭ tiam io povus okazi, ĉu ne ?

Mi esperas ke estontece ni povos kunlabori.

Multajn elkorajn salutojn kaj bondezirojn de  
*Rŝi* [-Kumaro Daso, t.e. Bob Felby]

– *Konsentite: bonvolu organizi IRKE-n dum la UK.*

Savigny, la 28an de Oktobro  
Mi esperas esti dumlonge leganto de via revuo kaj mi deziras al vi grandan sukceson, ĉar laŭ mia opinio, forta religia movado tolerema en Esperanto povus esti la savo de nia lingvo minacata per pereco (...) Reirado al religieco estus la reirado al vojo dezirata de Zamenhof mem, kio sekurigus la estonton de la *Lingvo Internacia*. *Jean Martignon*

Plock, 7.3.1995

Januare, tempe de la semajna ekumena preĝo mi renkontiĝis kun s-anino Pasztowa, de kiu mi eksciis pri vi. Jes, antaŭ kelkaj dekoj da jaroj, membroj de la **Mariavita Eklezio** amase ĉeestis en la E-movado. Nune en nia pastraro estas mi sola. Sed mi jam ne plu estas esperanta aganto de 20 jaroj. Mariavita Eklezio ne estas multa en Plock. Neniam ĉi tie estis multe da konfesantoj. En nia biblioteko ne ekzistas esperanta fako. *p[astro]. F.W. Rostworowski*

Spanga, 1995 04 12

Pri *La serĉado de l'Sankta Gralo* : por mi la "esperanta" traduko estas same malfacile komprenebla kiel la originalo. Tiaj arkaismoj estas defendeblaj se ili aperas kiel citaĵoj de malnova teksto en nova, aŭ en traduko se jam la originala verkisto skribas arkaisme, sed laŭ mia scio tiu teksto estis skribata en la normala lingvo de sia tempo. Certe do la verkisto ne inventis propran dialekton por sia teksto : do ankaŭ la tradukisto ne rajtas tion fari.

Pri *La Abatejo de la Deziro* : tre interesa, sed ĉu la tradukisto ne faris detalan eraron ? Rabelais skribas *Tuscan*, tradukite kiel *la germana* – sed la toskana estas la normiga dialekto de la itala, la lingvo de Dante. (Ĉu la traduko estas farita de skandinavo ?)

Gunnar Gällmo

**Respondo** : Pri *Tuscan* vi pravas. La traduko estis farata de mi kiu, kvankam franco, tiam restis duon-skandinavo post unujara restado en Norda Norvegio kiel esploristo ĉe la Universitato de Tromsø. Mi estis misinfluata de la vorto *tysk*. Sed post kontrolo en moderna fr. trad., kie estas skribite *italien*, mi konfesas mian eraron. (La fr. trad de Toskanio estas *Toscane*)

Pri *La Serĉado del Sankta Gralo* mia vidpunkto ne estis tiu de la verkisto sed de la nuna franca leganto kiu hazarde trovas kaj provas legi nekonatan manuskripton el la XIII-a jc (vidu la averton en n-ro 15 p.16). La malfacileco estis do tute intenca.

Ofte iuj plendas ke en esperanto mankas lingvaĵ-niveleoj : stiloj familiara, popola, slanga, arkaika... Kelkaj jam provis verki tekstetojn en arkaika stilo kaj skribmaniero de ili elpensitaj (almenaŭ Kalocsay kaj probable Waringhien). Anstataŭ inventi ion tian el nenio, kiel ili, mi preferis "science" krei arkaikan lingvaĵon, el kio nenio estas de mi.

**Sed se tio malebligas al iu legi tiun valoran tekston, eble mi ĉesos la provon kaj daŭrigos la tradukon en normala esperanto: la legantoj decidu !**

Shkoder, 22.4.1995      Mi legas plezurege vian tre belan Organon (...) El via lasta n-ro 16 mi tradukis **albanlingven** : "*500-a naskiĝdatreveno de Frato Francisko Rabelais*".  
Zef Mjeda

Zeltweg      *MI ESTAS la dia suno en via koro,  
kiu ekbriligas vin kiel ora KRIST-ALO.*

Tolero estas gravega leĝo por la vojaĝo nia al la lumplena unueco. Kiel do esti toleremaj, se ne ekzistus diverseco ? Ĉiam, al ĉiu *religiulo* mi diras : Estu feliĉa pro via religio kaj gardu ĝin Diosindone kaj sekrete, kiel oran trezoron. Ne gravas kion pensas kaj diras la aliaj pri Dio. Mi sendos monon al vi : bv. donaci abonon al nepagipovanta. Por la venonta sankta tempo mi deziras Lumon, Pacon !      Anton [Schaeffer]

Uetersen, 3.6.95

(...) Antaŭ jaroj mi esperantiĝis, poste kristaniĝis, poste forlasis la E-movadon. Ĝi ŝajnis al mi malsufiĉe utila, kaj ankaŭ pro privataj kaŭzoj mi ne plu ŝatis la movadon. Mi aliĝis al **baptista eklezio** en mia loĝloko kaj tie aktivas. Tamen mi nun pripensas, **ĉu ne estus bone iomete reveni al la E-movado**. Estas ja domaĝo, ke mi lernis la lingvon kaj nun ne plu uzas ĝin. Kaj mi pripensas ĉu mi povas iel utiligi mian konon de E-o por la regno de Dio. Ĉar ties progresigo estas pli grava ol la progresigo de tiu lingvo Esperanto. Jen, tio estas miaj ideoj, kaj mi nun simple informis vin pri ili, kaj mi ne scias ĉu tio vere interesas vin. Se jes, vi povas respondi al mi, sed ne devas. Afable salutas      *Sven Walper*

Strasburgo, la 5an de nov. 1995

Mi ne scias ĉu ASISTI devas plu ekzisti, sed laŭ mi :

– **Devas plu ekzisti Asistilo**, tio estas ankaŭ la opinio de Ester Poder. Ricevinte la n-ron kiun mi sendis, ŝi skribis ke ŝi nepre volas daŭre ĝin ricevi.

– **Devas plu ekzisti la seminarioj**. Mi iom bedaŭras ke Pavla ŝanĝis la temon, kiun ni elektis en Szombathely. Sed interesas min diskuti pri korpa kaj psika sano kaj religio. Laŭ mia opinio la *revelacio de Arès* estas psikoza deliro simila al tiuj kiujn mi mem havis. Francisko Degoul scias ke mi tiel opinias, sed kompreneble ne konsentas.

– Estas gravaj ciaz interreligiaj kontaktoj, sed estus dezirinde ke **aliaj ASISTI-anoj havu similajn kontaktojn**. Jes mi scias, ci serĉas alian sekretarion kaj lin aŭ ŝin ne trovas : nu, ĉiam estas same kiam aperas kompetentulo, li fariĝas neanstataŭebla. Ja la tombejoj estas plenplenaj de neanstataŭebluloj, sed tiom longe kiom ci ne kuŝos tie, verŝajne la aliaj pensos "*li nur daŭrigu*".

Antaŭ pasko mi pensis "*estis belege pasintjare en Tabor, sed revelacion oni ne havas dufoje, do eble mi estos seniluziigita en Szombathely*". Mi tute ne estis seniluziigita, do mi ŝatus partopreni en la tria *Seminario*. (...) Mi donos prioritaton al la seminario de ASISTI rilate al iu ajn alia E-aranĝo.      *Jacqueline*

**2-a Internacia Junular-Konferenco en Minsk**  
**« 10 jarojn post [Ĉernobil] : Ekologia kaj spirita etiko kiel komuna religia tradicio »**

En la angla kaj rusa, de la 2-a ĝis 5-a de majo 1996  
**Celo** : Interreligia dialogo kaj kunlaboro por alporti **al la viktimoj de ekologiaj katastrofoj spiritan, psikologian subtenon kaj praktikan asistadon**. Por 18/35-jaruloj. Prezo : 250 DM por la 4 tagoj. Datlimo: 31-3-96. Se vi interesiĝas, skribu tuj al la red. ASISTI eble subvencios. Adreso : BIA, 14-30 Chernyshevskogo St., Minsk 220013, Bjelorusio. Tel/faks.: +375 (172) 328589.

## Estimataj Asistanoj

Kuraĝe ni levigas la voĉon de Ciono - por ĉi-gazete alparoli la kunlaborantaron ĉie en la mondo, por nova nobla religia kompreno

### MIA UJO

~ Nonoreko ~

Ujo, ujo, ujo mia  
ĉielvasta, bela mondo Dia  
ke estu ĉiu molekulo  
benata de mi hejmuldo


Profunde kaj treege  
amas mi - kaj sentas  
la vaston, kiu rege  
la brizojn milde ventas

Kaj en ĝardeno staras  
alia tre amata uj'  
kaj abeloj rapide paras  
ties seksojn verve tuj

Mia tria ujo estas nigra  
nigra kiel la nokto mem  
tie fluas tuĉo pigra  
brila kiel safira gem'

Mi trempas plumskribilon  
en la ujon, nun laŭmore  
por prikanti mi lulilon  
infanujon tre elkore.

Erco Baraka



Jen esperanta kajero  
"La Kvara Templo" de  
D-ro Jichak Hajutman  
Prezo: Nur 1 gld. ĉe  
CENTRO SIVRON

# מרכז סיורון CENTRO SIVRON مرکز سقرون

Box 23180 ת"ד  
11-91 231 Jerusalem


ירושלים ארץ ישראל  
Tel: 972-(0)2-86 6249

Ni povas konigi belan novaĵon al Esperantujo nome la freŝa eltrovo pri la origino de la nomo LUDOVIKO de nia Majstro. Li prenis ĝin de iu riĉa belgodevena svedo *Louis de Geer* kiu elspezis siajn milionojn, gajnitaj per kanonproduktado, por multaj indaj humanistaj taskoj. Interalie li pagis la vivrimedojn por la ĉeĥa erudiculo kaj ĉefepiskopo Johano Amos Komenius dum lia restado en Svedujo, eldonante kaj perante liajn librojn, kaj poste aranĝis por lia restado en Amsterdamo ĝis ties morto en 1670. Dankeme Komenius dediĉis sian libron "Nova Lingva Metodo" al tiu svedbelga filantropo.

Iom hazarde ia posteulo en tiu familio kun la sama nomo *Louis de Geer*, ne nur ellaboris la modernan svedan konstitucion sed ankaŭ fariĝis la unua ĉefministro en Svedujo, kaj ĝuste en la sama jaro (1876) kiam la juna gimnasisto (tiam en la 6-a klaso) Samen Hof subite ekkriis ("HEUREKE") "SKAJA-SKAJA", *La Problemo Estas Solvita* - io kio rezultis en la naskiĝo de LINGWE UNIWERSALA du jarojn poste.

Cetere tiu ŝlosila vorto "Skaja" ankaŭ estas konata de la ribelema rusa sekto "Sionskaja vestj" (Cion-EJA sciigo) kies gvidanto N.L. ILJIN ankaŭ ellaboris lingvoprojekton kaj proponis homaranan komunecon "por ke la homoj fariĝu unu familio". [Por pli detala artikolo, kiun mi nuntempe detaligas kaj kontrolas, skribu al mi. Zamenhof parolas pri tiu nomelekto en sia letero al la onklo la lingvisto Josef].

Jeremi Gishron



La Akademio de Jerusalemo apartenanta al la Fonduso Ĥajut lastatempe lanĉis sian kampanjon por "REALIGO DE LA ĈIELA JERUSALEMO" kaj ilia broŝuro, ankoraŭ nur en la angla, estas havebla je la adreso Pk. 8115, IL-91 080 Jerusalemo. Jen D-ro Ĥajutman klarvide konstatas ke la malnova cionismo eniris sakstraton kaj tute ostiĝis. CIONO ja signifas Jerusalemon, kaj li proponas sciencan-kulturan spiritan renovigon de la malnova sonĝo de la profetoj, kaj li citas la ĉielan Jerusalemon el libroj de la kristanoj, islamoj, judoj, en profetoj, talmudo kaj kabalo, kaj eĉ la legendan landon SHAMBHALA de Budho kaj la himnon de la Britaj Laboristoj (partio laŭdata de Karl Marks):

(mi iom libere tradukis  
la faman poemon de William Blake)

Mi ne ĉesos kun spirita lukto  
nek la glavo dormos en mia man'  
ĝis ni finkonstruos Jerusalemon  
en la Angla Lando kaj laŭ angla plan'

En ESPERANTO, skribu al mi por informoj!

# Por mondharmonio : la *Homekologio*

Okaze de la 50-jara jubileo de UNO, estis prezentata al ties kultura organizaĵo UNESKO la mondkoncepto *Homekologio* – t.e. ĝenerala spirita kaj lingva interkompreniĝo – por rekomendi ĝian kompleksan realigon al kompetentaj internaciaj organizaĵoj (preparo kaj mondpatroneco) kaj al ĉiuj Ŝtatoj-membroj (celkonscia efektivado).

Tiu ĉi mondkoncepto estis kompilita surbaze de ideoj kaj iniciatoj de la 1-a ISE<sup>1</sup>, de la 6-a WCRP<sup>2</sup>, kaj de la studo *J.A. Komenius – L.L. Zamenhof : la Vojo al Harmonio*<sup>3</sup>. Ĝi prezentas praktikajn vojojn al mondharmonio, speciale akomoditajn por pionira ekpaŝo per la tutmonda junularo, interalie kun jenaj ĉefproponoj : « Ĉiuj elementaj lernejoj, en la tuta mondo, dediĉu almenaŭ unu horon semajne por instruado de la nova lernobjekto *Homekologio*, konsistanta el du fakoj :

« 1. *Ekologio de interkompreniĝo* : En la unua jaro, instruado de fundamento de la neŭtrala lingvo Esperanto. (Preparo kaj mondpatroneco : UEA<sup>4</sup>).

« 2. *Ekologio de spirito* : En pluaj jaroj, kreado de firma, morala fundamento por vivo de lernantoj, per instruado de mondetiko<sup>5</sup>, helpe de la – per kompetentaj fakuloj kompilotaj – aĝ-adekvataj antologioj<sup>6</sup> el universale validaj, religiaj eĉ filozofiaj, moralaj principoj, saĝoj kaj vivmodeloj, tuthomare valoraj kaj akcepteblaj. Instruado rekte en esperanto, komence en formo de pliperfektiga kurso. (Preparo kaj mondpatroneco : *Monda Parlamento de Religioj* kiu, okaze de sia 100-jara jubileo (anglalingva kunsido en Bangaloro, Bharato, 1993), proklamis : "*Neniu nova mondordo sen mondetiko ! Ĉiuj homoj, precipe jam junularo, devus lerni ĝin !*"<sup>7</sup>

« **Rezulto** : frekventintoj de tutmondaj elementaj lernejoj kapablos tutmonde, reciproke – ĉiu kun ĉiu – facile interkompreniĝi sur neŭtrala lingva fundamento kaj agi laŭ unueca, baza mondetiko. Kulturonte eĉ plue, plene, siajn naciajn, religiajn k.a. specialaĵojn, ili fariĝos modeloj kaj pioniroj de la mondharmonio.

« La mondo de matur-aĝuloj – vidonte tiun ĉi praktikan efekton en la mondo de la junularo – espereble ankaŭ ekpaŝos la prezentitan vojon al mondharmonio. Se ne tuj, do pli poste, kiam gejunuloj – maturiĝonte – fariĝos ĝiaj anoj. »

1/ Interreligia Seminario Esp. (Tábor, CZ, aprilon 94).

2/ La 6-a *Mondkonferenco de religioj por paco*\* (Riva del Garda, Italio, novembro 1994). \*Fakte **pri Religio kaj Paco** : *World Conference on Religion and Peace*.

3/ MEM, Str. des Hineux 54, Herstal, Belgio, 1992.

4/ Ni vidas ke vi iom progresigis similan proponon de J. Karhan en Asistilo n-ro 6 (1990) : *Por tuthomara harmonio (per Kosma ekumeno)* nun imagante konfidi la preparon al preciza instanco : ĉu UEA aprobe respondis al via ideo ?

Omaĝe al la 50-jara jubileo okazis – en okt. 1995 – la solena UN-kunsido, kiun partoprenis estroj de ĉiuj ŝtatoj-membroj. La prezidento de la Ĉeĥa Respubliko – kie okazos la 81-a UK – **Václav Havel**, prezentis tie, en sia oficiala parolado, sian propran vizion pri tuthomara vivo kaj UN-ago en la 21-a jc., esprimante interalie jenajn ideojn :

« (...) *En prafundamento de buntaj kulturoj, civilizaciaj aferoj eĉ religiaj mondoj, ekzistas la samaj elementoj, moralaj principoj, ofertantaj ŝlosilojn al tuthomara kunvivado sur nia Tero (...)*

*Se ni ne volas ke la estonteco de la homaro estu minacota per konfliktoj de unuopaj civilizacioj aŭ kulturaj aferoj, ni havas unusolan eblecon : serĉi unuecon en ilia diverseco. En tio mi vidas ununure eblan fonton de nova spirito kaj de nova etiko por la tutmonda kunlaboro, eĉ renovigitan respondecon de homo por la mondo (...) ankaŭ ununure eblan, spiritan fundamenton por plua, sencoplana UN-ekzisto. »*

La mondkoncepto *Homekologio* uzas ĝuste tiun ĉi ŝlosilon por la tuthomara harmonio, kiun ĝi krome potencigas per ĝenerala, facila, neŭtrala lingva interkompreniĝo. Samtempe ĝi realigas la samcelan homaran<sup>8</sup> vizion de Zamenhof pri baza unueco en diverseco religia kaj lingva, eĉ analogan vizion pri plibonigo de la aferoj tuthomaraj, de "*instruisto de nacioj*" J.A. Komenius, esprimitan en lia verko *Via Lucis* (Vojo de Lumo, 1642).

La 81-a UK 1996 en Prago, kies temo estas « *Kulturo : valoro aŭ varo ?* », povus, surbaze de konsultoj en kompetentaj, fakaj kunvenoj (religiaj, teologia, instruista k.s.) – fari efikajn, praktikajn paŝojn por realigo de la mondkoncepto *Homekologio*, pruvante ke en kulturo eĉ religio estas gravaj tuthomaraj valoroj, kaj aplikante ilin celkonscie por faciligi eĉ plirapidigi efektivigon de la vizio pri tuthomara harmonio kaj tutmonda paco.

**Homaranoj**, *Esperantujo*, Zamenhof-Tagon 95 Enkonduke de la konferenco « *Estonteco de espero* » en Hiroŝima, la 5-12-1995, prezidento Václav Havel esprimis analogajn ideojn. Aldonita noto [de **J. Karhan**]

N.B. En la ĉi-malsupraj notoj de la aŭtoro(j) la redaktoro aldonis siajn proprajn, kiuj estos tuj rekoneblaj ĉar ĝustigajn aŭ eĉ (amike !) kritikajn...

5/ En la manuskripto: *etoso* influe de germana *Weltethos*

6/ Modelo: antologio de O.P. Ghai : *Unueco en diverseco: La unusola vero en la skriboj de ĉiuj religioj*, Horizonte V.

7/ Detaloj en *Proklamo pri mondetiko*, tie prezentita de Hans Küng kaj aprobita per reprezentantoj de ĉiuj religioj. 3 eraretoj: ne en Bangaloro (kie la red. estis) sed en Ĉikago (vd. trad. en 15 p.4); li verkis proponon *prilaboritan* de ĉeestantoj kiuj **ne** reprezentis religiojn, almenaŭ certe ne ĉiujn

8/ Homaranismaj libroj: Bismarckstr.28,D-35037 Marburg

# Nuntempaj spiritaj mesaĝoj

« Kristanoj, hebreoj aŭ mahometanoj  
Ni ĉiuj de Di' estas filoj. »

(Zamenhof)

La 5-an de aŭgusto 1905, Zamenhof ne eldiris tiujn du versojn antaŭ la Bulonja Kongreso, ĉar liaj Parizaj amikoj rifuzis tion<sup>1</sup>. Kvankam liaj alvokoj al homa frateco plene sukcesis emocii ĝis larmoj la buntnacion ĉeestantaron<sup>2</sup>, de Zamenhof, la *juda profeto* kiel malŝate diris Bourlet<sup>3</sup>, la alvoko al interreligia frateco estis fakte cenzurita.

Cenzuro ne efikas eterne. La 9-an de novembro 1977 en Arès, alia apudmara urbeto de Francio, eldiriĝis el lumega bastono<sup>3</sup> vortoj samcelaj, aŭditaj de Michel Potay, la atestanto: « *Le bruit d'homme : yhoudi, mousselmi, christane* »<sup>4</sup>.

Kiel ni traduku al esperanto tiun ĉi frazon, strange buntlingvan kaj densstilan kiel la tuto de la 50-paĝa « *Libro* »? Ni lasu la judan kaj araban formojn *yhoudi* (judo) kaj *mousselmi* (islamano) en iliaj prononcitaj formoj.

Pli strangas la formo *christane* (kristano) ĉar, laŭ mia scio, tiuj ĉi francaj literoj, fonetike *kristan'*, sonas kiel vorto de nenies lingvo, escepte de esperanto: la latina formo estas *christianus*, la franca *chrétien*, ktp.

La traduko kaj transliterumado de ambaŭ elementoj de la menciita frazo sekve fariĝas: « *La brua homo : jhudi, muselmi, kristan'.* »

Do, el ununura revelacio, religiojn kreas homo, ĉar la vorto *bruo* en la verko ĉiam signifas homan parolon kiu perdis sian Dian karakteron. Al tiu Dia karaktero precize la homoj estas vokitaj reveni, al la *Dia bildo* de la Edena paradizo<sup>5</sup>, kies *tempon* la homaro devas restarigi<sup>6</sup> ĉar « *la Vero estas ke la mondo ŝanĝiĝu* »<sup>7</sup>.

Venontfoje, ni reparolos pri ligo inter preĝo kaj ago al tiu ŝanĝo.

(sekvote)

François Degoul

1/ *Leteroj de Zamenhof*, I, p.175.

2/ Samloke; kaj Edmond Privat, *Vivo de Zamenhof*, p.64 kaj 69.

3/ *La Révélation d'Arès*, ĉe Maison de la Révélation, FR-33740 Arès, p.191-192 en eldono 1989.

(Pagita anonco)

4/ En sama verko p.308: *Le Livre*, XXXII,8.

5/ *Genezo* I,27 kaj II,8.

6/ *La Révélation d'Arès*, eld. 1989 p.150: *L'Évangile donné à Arès*, XXXV,2.

7/ Samloke p.118: *L'Évangile donné à Arès* XXVIII,7.

## (Interŝanĝaj anoncoj)

LA JAPANA BUDHANO  
N-ro 284 JANUARO - FEBRUARO 1996  
ENHAVO

卷頭言	石黒 漢子	1
Dougen parolis jene (10)	Okcidento	2
仏教語の訳について	西 泰宏	8
本の紹介	編集者	10
お便りから		11
合掌のある生活	佐村 隆英	13
本誌の制作について	編集者	15
川上賞受賞について		17
新年名刺広告		18
水の味 Gusto de akvo	高原 憲	19
勝鬘經Granda Parolado de Srimalo	IZUTANI Kon'an	23
Letero de Svedio pri Terminoj	Gunner GÄLLMO	26
ASISTILO 13 号目次		28
目次, El Redakcio		29

目次

## La Kosmologio de Martinus

Logika vivklarigo kiu kondukas al pozitiva vivsinteno - kaj al pacaj kaj harmoniaj rilatoj inter homoj. Legu pri la kosmologio en la nova revuo KOSMOS.

Petu senkoston provekzempleron ĉe Martinus-Instituto, Mariendalsvej 96, DK-2000 Kopenhago F, Danio. ☎ +45 3834 6280 - Fakso +45 3834 6180

Nenia unuigo aŭ membreco

## La Kancerkliniko

Politika, Kultura, Skandalema, Ajnista

"La mondo ŝanceliĝas, Nia Kliniko plu staras"

5 numeroj jare  
125 FF / 42 gld\*

Direktoro kaj Redaktoro: Jacques Le Puil  
"Les Cocherats", F-18210 Thaumiers, Francio  
(pĉk Paris 12 729 73 X (aŭ UEA-konto *klik-g*))

(\* 25 gld por malpli riĉaj landoj...)

## Biografieto\* de kandidato al la Prezidanteco

### Yosimi UMEDA

Naskita en 1933 en Hakodate, Japanio. Nuna profesio : docento ĉe la *Specialigita Kolegio por Stenografoj kaj Sekretarioj* en centra Tokio, instruanta la dinamismajn artojn por komunikado (inkluzive de la internacia komunikado).

Yosimi studis la anglan literaturon ĉe *Keio* Universitato en Tokio ; religiajn praktikojn ĉe la *Oomoto-Centro* en Kameoka (apud Kioto) ; parolarton ĉe *Chaminade* Universitato en Honolulu (Hawaii) ; kaj ankaŭ internacian komercon kaj administradon ĉe *Japan-American Institute of Management Science* en Honolulu.

Esperantisto ekde 1951, Yosimi aktivadis en la gvidaj roloj de **Esperanto-movado** en Japanio kaj internacie, kiel montras liaj eksaj funkcioj : Ĝenerala Sekretario de E.P.A. (*Esperanto-Propaganda Asocio* de Oomoto) ; Estrarano de T.E.J.O. (*Tutmonda Esperantista Junulara Organizo*) ; Direktoro de *Japania Esperanto-Instituto* ; kaj Vic-Prezidanto de UEA (*Universala Eo-Asocio*).

**Aktuale** li estas Prezidanto de ASISTI (ekde junio 1990), estante unu el la iniciatintoj de la *Inter-Religiaj Kunvenoj Esperantistaj* (IRKE), kiuj havas sian lokon en la *Universalaj Kongresoj* ekde 1969.

Liaj pasintaj profesioj inkluzivas karieran misiiston ĉe la *Oomoto Centro*, kiu estas vaste konata religia movado bazita sur la Sekta Ŝintoismo, servinte tie 25 jarojn, dum kiuj li i.a. deĵoris dum du jaroj kiel Ĝen. Sekretario de *Japania Religia Ligo*, kaj funkciis kiel Programa Direktoro de la Organiza Komitato por la unua *World Conference on Religion and Peace* (WCRP : Monda Konferenco pri Religio kaj Paco), okzinta en Kioto en 1970.

Yosimi nuntempe gvidas kiel Ĝen. Direktoro la akademian organizaĵon "*Internacia Ŝintoa Fondado*", kiu havas centrojn en Tokio kaj Novjorko.

Li estas atingebla ĉe la jena **adreso**, ĉu poŝte, ĉu telefone, ĉu fakse, ĉu *internete* : Yosimi Umeda, Nishi-Koiwa 1-19-33, Edogawa-ku, Tokio 133. Telefono kaj telefakso : +81-3-3672-5143. *Interneto* (du eblecoj : ) belabona@alpha-web.or.jp / shinto@alpha-web.or.jp.

\* Ĉefe priesperanta kaj prireligia.

Mi estas aktiva membro de ASISTI por la jaro 96 (Mi ĝiris/as por tio F (aŭ gld), la - -199 al *Asistilo*, pĝk n-ro 10 421 77 R Mars. (aŭ UEA : *asis-r*) *Fakultative*: Mi (re)abonas *Asistilon* por la jaro(j) 1996, 1997, 199 : x 32gld (...Oni ankaŭ rajtas **retroaktive aboni** la *senpage* ricevitajn n-rojn !)

NOMO :

Antaŭnomo :

Adreso :

Poŝtkodo :

Urbo :

Lando :

Dato : - -1996 Subskribo :

## Biografieto\* de kandidato al la Sekretarieco

### Christian Lavarenne

Naskita en 1956 en Bourges, Francio. Nuna profesio : duontempa oficisto de *Hejmoj de Internacia Kulturo* (ekde 15-1-96) kaj prireligia verkisto.

Christian studis la klasikan literaturon (latina, greka kaj sanskrita) ĉe Universitatoj *François Rabelais* en Tours, *Provenca* en Aix (plus esperanton) kaj *Michel de Montaigne* en Bordeaux (plus filozofion de la religioj); meditadon, iomete da tibeta ĉe franca *kagju*-a monaĥejo ; teologion ĉe la *Katolika Instituto* en Toulouse (kun tezo pri la franca origino de IKUE). Li estis stipendiita esploristo ĉe la Universitatoj en Kalikato (Okcidenta Bengalo, Bharato) kaj en Tromsø (Nord-Norvegio), kaj doktoriĝis per tezo titolita "*Sùamio B. Upadhjaj (1861-1907): kristana teologio kaj vedanta penso*" (1991).

Li eklernetis **esperanton** en 1972 (15-jara) sed esperantiĝis nur en 1985 ; iom partoprenis en la *Biciklado tra Eŭropo* organizita de Jorgos por la centjariĝo, kaj sekvajn. Li estis (aŭ daŭre estas) membro de FKEA (*Franca Katolika E-Asocio*), IKEL (*Internacia Komitato por Etnaj Liberecoj*), UEA, TEĴA (*Tutmonda E-ista Ĵurnalista Asocio*), patrono de JEFO (*Junulara E. Franca Organizo*)...

Li provadis fondi esperantistan komunumon (en Tromsø, en Moresnet (B), nun en Pireneoj) ; kunfondis ASISTI (kiun li aligis al IARF : *International Association for Religious Freedom*, Internacia A. por Religia Libereco) ; kaj HIK (*Hejmoj de Internacia Kulturo*, por esperantaj komunumoj).

**Aktuale** li estas ASISTI-sekretario kaj red. de *Asistilo* (ekde ties 1-a n-ro en 1988) kaj de *Hejmoj* ; kasisto de UTSLE (*Universala Tao-Stud-Ligo E*), kiun li kunfondis dum la UK en Valencio (1993) ; UEA-delegito pri orientalismo kaj religikomparado.

Liaj pasintaj profesioj inkluzivas *Predikistan Fraton* (ano de katolika ordeno fondita de sankta Dominiko en la XIII-a jc.) dum tri jaroj ; monitron pri budhana filozofio kaj ĉe la biblioteko de ILGEOS (en Aix, *kies E-fako riskegas malaperi*) ; licea instruisto pri la franca (kaj, fakultative, Eo).

Christian nuntempe estas dir. de *Hejmoj de Internacia Kulturo* kaj kuratoro de ties E-biblioteko.

Mi aprobas la reelekton de Yosimi Umeda al la posteno de ASISTI-prezidanto: jes / ne

Mi aprobas la reelekton de Ch. Lavarenne al la posteno de ASISTI-sekretario : jes / ne

Anonima balotilo resendenda antaŭ la 30-a de junio al : ASISTI, Presbytère, F-09800 Balagué, Francio en anonima koverto metita en duan koverton, kun la ĉi-apuda respondilo. Por rajti partopreni oni devas esti paginta sian 1996-kotizon (sendependan de la abono)